

BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

EN LA NUMERO:

Antaŭ 38
jaroj

La Patrolanda
Fronto

Esperanto en
malliberejo

Heroa
pasinteco


Sukcesa
porpaca
kampanjo

Infana
assembleo

20 jarojn
„Verda
Raketo“

La UEA —
kongreso

Literatura
konkurso de
„BE“



ANTAŬ 38 JAROJ

Antaŭ 38 jaroj, en septembro 1944, venke eksonis la sonorilejoj de la Libero. La bulgara popolo ribelis kaj forbalais la faŝistan regpotencon en la rubujon de la historio.

Pli ol 20 jarojn daŭris la batalo por libero. Furiozis teroro. Milittribunaloj starigis pendumilojn por la antifaŝistoj. Gendarmoj atakis gerilanojn per fusiloj, mitraloj, bomboj kaj eĉ militaviadiloj. Sur montaj valoj kaj erikejoj kuŝis kadavroj senkapigitaj. Tamen la murdistoj ne sukcesis estingi la revon pri libero, pri inda homvivo.

Cvetan Spasov, poeto-esperantisto — versis pri tiu revo:

Sur kampo floros papavoj.
La vivo brilos en ekstazo.
Feliĉos junaj geamantoj.

La revo de la frue pereinta poeto estis revo de miloj da gejunuloj bulgaraj. En la nomo de altaj idealoj ili suferis en koncentrejoj kaj prizonoj, malsatadis kaj frostadis en la partizanaj bivakoj. Ja neniu devigis ilin al sinofero krom la volo servi al sia popolo.

Unuiginte sub la standardo de la Patrolanda Fronto, nia popolo venkis la ekspluatistojn kaj ekiris sur la vojo al socialismo, obeante al la prudenta kaj aŭtoritata voĉo de la granda filo de la bulgara gento Georgi Dimitrov. „Dum unu-du jardekoj nia popolo devas atingi la altevoluintajn landojn“ — diris Dimitrov antaŭ la Kvina Kongreso de la Partio en 1948.

Kun Aprila impeto nia laborista klaso, kamparanaro kaj intelektularo sekvis la direktivojn de la Gvidanto.

En intermontoj ekbrilis speguloj de baraj lagoj. Laŭ la marbordo, laŭ Danubo kaj Marica elkreskis uzinoj kaj senlimaj frukt-gardenoj. Novaj ŝipoj kun trikolora flago krezas sur maroj kaj oceanoj. Nokte pli hele ol la steloj brilas la elektraĵ lampoj, nutrataj de potencaj centraloj. En sunplenaj novaj domoj legas laboristaj familioj. En infanvartejoj floras belaj floroj — infanoj de la laboruloj. Junaj amparoj forĝas sian feliĉan sorten. Kaj ĉio ĉi nur dank'al la Bulgara Komunista Partio!...

La akiraĵoj de la venkinta bulgara popolo maltrankviligas la transoceanajn imperiistojn, kiuj volas submeti al siaj monstraj planoj milojn da homoj en Eŭropo, sed la popoloj ne deziras cindriĝi en la flamoj de „limigita“ aŭ „daŭra“ nuklea milito.

Ankaŭ ni bulgaroj volas plu forĝi nian estontecon en paco kaj amikeco kun proksimaj kaj malproksimaj popoloj. Kun tiaj sentoj kaj intencoj nia popolo eniras la 39-an jaron de sia libera vivo, por enskribi novan paĝon en sia glora historio.





BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

JARO 51

AŬGUSTO —
SEPTEMBRO

8-9 • 1982

LA PATROLANDA FRONTO — STANDARDO DE LA SOCIALISMA REVOLUCIO

SAVA DALBOKOV — unua vicprezidanto de la
Nacia Konsilio de la Patrolanda Fronto

La kreo antaŭ 40 jaroj laŭ iniciato de Georgi Dimitrov de la tiutempe sava por niaj popolo kaj ŝtato Patrolanda Fronto montris la absolutan neceson de unueco de la popolamasoj por bari la vojon de la faŝismo kaj la milito kaj por la konstruo de pli justa sociordo.

Post la venko je la 9-a de Septembro 1944 la Patrolanda Fronto aligis aktive al la konstruado de la nova sociordo.

Nun, post la Naŭa Kongreso de la Patrolanda Fronto, la klopodoj de la aktivularo estas direktitaj al efektiviigo de la decidoj de la XII-a Kongreso de BKP kaj al ilia realigo en la vivo dum la VIII-a jar-kvino. En la sociekonomia admi istrado de la lando la Patrolanda Fronto okupas sian lokon kiel esprimanto de la intereso de la loĝantaro, precipe de la loĝlo-kaj sistemoj, kvartaloj, vilaĝpartoj.

Pro tio la iniciatoj efektiviĝataj de ni okaze de la 40-jara jubileo de la Patrolanda Fronto estas ligitaj kun la homoj mem. Ili estas direktataj al plua kaj sukcesa disvolviĝo de la nacia ekonomio.

Niaj ceteraj iniciatoj estas ligitaj kun konservado kaj protekto de la naturo, kun variiĝo kaj plibonigo de la servoj.

Nun mi deziras tuŝi alian problemon, rekte ligitan kun la bulgara E-movado. Mi ĉeestis la 40-an kongreson de Bulgara Esperantista Asocio en urbo Plovdiv kaj salutis la kongresanojn en la nomo de la Nacia Konsilio de la Patrolanda Fronto. Per kio plej forte impresis min la Kongreso?

Tiun altan forumon de la bulgaraj esperantistoj mi ĉeestas duan fojon. Unuafoje mi partoprenis en esperantista kongreso kiel lernanto, kiam mi regule okupigis pri la Internacia Lingvo. Kaj mi estas profunde konvinkita pri la pozitivaj kvalitoj kaj pri la utilo por la popoloj, se ili aplikus ĝin en siaj kontaktoj. La tasko, kiun prenis sur sin la esperantistoj, estas tre malfacila, sed ĝi estas grava kaj la vivo mem konstante pruvas tion. Mi estis agrable surprizita, ke nun la esperantista movado tiom multe elkreskis kaj ĝuas grandan socian rekonon kaj prestiĝon.

Min forte impresis la certeco de la kongresanoj, ke ili marŝas laŭ gusta vojo, utiligante Esperanton por popularigo de la atingitaj sukcesoj en nia socialisma patrolando. Tre evidenta estis la unueco ĉe solvado de la antaŭstarantaj taskoj por atingi de la altaj celoj kaj ties apliko en la nunaj favoraj kondiĉoj, kreitaj de la popola registaro sub la gvido de la Bulgara Komunista Partio.

La kongreson ĉeestis multaj ĝejnuloj. Tio atestas pri la vivopovo kaj la perspektivoj de la bulgara esperantista movado. Laŭ mia opinio, la Kongreso pasis je alta idea-politika nivelo kio pruvas la maturecon de la esperantistaro. Tie ĉi mi volas speciale emfazi, ke efektive kun tiaj homoj la Bulgara Esperantista Asocio povas ekstarti en la unuaj vicoj de la tutmonda esperantista movado. Kaj tio estas precipe necesa nun, kiam oni devas

defendi la pacon. Principe la esperantistoj estas pacamantoj, tamen, jam ne sufiĉas nur stari sur pacifismaj pozicioj, la paco devas esti defendata per aktiva agado.

Kiel organizaĵo, fondita sub la gvido de Georgi Dimitroff, la Patrolanda Fronto estas objekto de pristudado fare de multaj amasaj movadoj en la aliaj landoj, precipe en la evoluantaj landoj. Ĝis nun estis utiligataj la rektaj kontaktoj kun la delegacioj, kaj por tradukoj estis uzataj naciaj lingvoj. Ĉe la aktiva kunlaborado de la Bulgara Esperantista Asocio por popularigo de la sukcesoj de la Patrolanda Fronto en la konstruado de la evoluanta socialisma socio povas esti tradukataj en Esperanton kaj eldonataj diversaj konvenaj materialoj. Ekzemple, la historio de la Patrolanda Fronto vekas intereson. Se ĝi aperos en Esperanto, oni tiamaniere diskonigos ĝin inter vasta rondo da legantoj el la kvin kontinentoj de la mondo.

Por realigo je nacia nivelo, evidente devas esti starigitaj aferecaj kaj konstantaj kontaktoj inter la respektivaj fakoj de la Nacia Konsilio de la Patrolanda Fronto (NK de PF) kaj la Centra Estraro de BEA. Perioda presigo de bultenoj kun decidoj kaj materialoj de la NK de PF

kontribuos por havigo de informoj, kiuj servos por interŝanĝo de sperto.

Nia eldonejo de la Patrolanda Fronto ĉiujare aperigas plej diversajn librojn. Oni povus trastudi la problemon kaj fari provon por aperigo de iuj libroj en Esperanto.

La Patrolanda Fronto unuigas plej diversajn sociajn, sportajn, kulturajn kaj aliajn organizojn kiel siajn kolektivajn membrojn. Inter ili estas ankaŭ la Bulgara Esperantista Asocio kun siaj specifaj taskoj. Dezirinde estas, ke ĝi popularigu inter la esperantistoj en la lando kaj en eksterlando la decidojn de la IX-a Kongreso de la Patrolanda Fronto.

Nia kunlaborado povus esti ankoraŭ pli ampleksa kaj celdirektita. Kiel amasaj movadoj, ni povas efektiviĝi komunan programon ne nur en la idea-eduka kaj kultur-amasa sfero, sed ankaŭ en la batalo por paco, por malebligo de la nuklea katastrofo.

Al la geesperantistoj mi deziras, ke ili gardu nemakulita sian konsciencon kiel membroj de la Patrolanda Fronto, insiste kaj konstante popularigu per siaj korespondadoj la sukcesojn de la reala socialismo, estu ĉiam kaj ĉiuloke ardaĵ patriotoj de prosperanta Bulgario.

AL LA 75-JARA JUBILEO DE BEA

ESPERANTO EN LA MALLIBEREJO

(Rememoroj)

NIKOLA ALEKSIEV,
heroo de socialisma laboro

Trafinte duan kaj trian fojon en la Centran malliberejon de Sofio, mi konstatis inter la junaj politikaj arestitoj certan intereson pri Esperanto.

En la ejo, kiun mi loĝis kun dekdu kamaradoj, la plimulto estis junuloj. Ili petis min instrui al ili Esperanton. Al tiuj entuziasmoj aligis ankaŭ la fama tra la tuta lando deputito de la Laborista Partio, eks-pastro Konstantin Poprusinov, kun la populara alnomo „Ruĝa popo“. Tiam li estis ĉirkaŭ 55-jaraĝa kaj posedis ekskluzivan scion. Entuziasme li studis la materialon de miaj ĉiutagaj okupiĝoj. Kompreneble, la junuloj, posedantaj freŝan memoron, pli facile parkerigis vortojn kaj regulojn. Tamen la „Ruĝa popo“ ne perdis kuraĝon kaj ree petis de mi klarigojn.

Mi rememoras jenan ridindan momenton. Instruante la regulon pri substantivoj mi donis kelkajn ekzemplojn: „soldato“, „caro“,

„popo“, „telefono“, „telegrafo“. Lernanto el la gimnazio de Ihtiman ĝoje ekkriis: „Ho, tion mi jam bone konas, ĉar en mia loka dialekto ni same diras: „caro“, „popo“, „telefono“...“ Interese, ke en mia naskurbo oni same tiel prononcas tiujn vortojn en la loka dialekto, sed dum mia lernado de Esperanto kiel komencanta gimnaziano mi ne rimarkis tiun koincidon. Eble tamen ĝi subkonscie helpis ankaŭ al mi dum mia aŭtodidakta lernado...

Mia kvara enprizonigo daŭris pli ol ses jarojn, kiujn mi pasigis en diversaj malliberejoj, komencante de Burgas. En mia kelo loĝis dek kamaradoj. Iuj ellernis Esperanton sub mia gvidado. Ni ne posedis lernolibrojn kaj vortarojn. Tial mi buŝe instruis ĉiun lecionon. Inter la kursanoj estis iu havenlaboristo Ilija Petrov Lilov, ĉirkaŭ 37-jaraĝa. Li estis la plej diligenta inter ĉiuj. Kvankam kun malalta lerneja klereco, li rimarkinde parkerigis kaj akurate utiligis la instruitan

materialon. Post la kurso li jam ekinteresiĝis pri esperanta literaturo, sed ĝi mankis ĉe ni.

Nur kiam oni translokiĝis nin al alia malliberejo ni trovis tie la esperantan tradukon de „Geracite“, novelo de la bulgara klasikulo Elin Pelin. Kamarado Lilov ĝin diligente tralegis, demandante min pri iuj lingvaj malfacilaĵoj. Inter la arestitoj estis k-do el Burgas, Nikola Petrov Nedjalkov. Li ege ŝatis la ŝercojn, sed ĉiam havis seriozan mienon. Iufoje li demandis k-don Lilov: „He, kion vi legas tiel atente?“ Li respondis: „Mi legas la esperantan tradukon de „Geracite“. Nikola Petrov turnis sin al la ceteraj kamaradoj: „Vidu tiun ulon! Li legas „Geracite“ en esperanta traduko, dum mi ankoraŭ ne legis ĝin en originalo! Ho, diabla havenlaboristo!“ (Tutempe la vorto „havenlaboristo“ estis kutime uzata kiel mokvorto por neinstruita, simpla laboristo). Kompreneble, k-do Lilov bone komprenis la subtekston de tiu ŝajna moko al li kaj akceptis ĝin kiel laŭdon fare de la aŭtoritata gvidkamarado pro sia sukcesa okupiĝo pri Esperanto.

Post nia translokiĝo al la malliberejo de Plovdiv, ni trovis tie tre severan reĝimon por la politikaj arestitoj. La prizonestro estis ege kolerigita pro la fuĝo de kelkaj kamaradoj, kiuj traboris subteran kanalon de sia kelo al la ekstera mondo. Plej bagatela preteksto sufiĉis, por ke oni turmentu nin plej malice.

Tie mi renkontis mian malnovan amikon Hristo Gorov (Hrima) kaj aliajn aktivulojn de LEA-sekcio de Plovdiv: Stojan Kostadinov, Nikola Stefanov, Kostadin Caĉanov k. a. Ni organizis instruadon de Esperanto buŝe, ĉar mankis lernolibroj kaj alia literaturo en Esperanto. La instruado antaŭeniris sukcese, sed estis necesa ĉiama atentemo pri la gardistoj. Foje okazis incidento. Iu kamarado decidis fari slipetojn kun esperantaj vortoj kaj ties signifo dorsoflanke. Sed elpoŝigante ilin surkorte kaj divenante la signifon, li ne rimarkis la alproksimiĝintan gardiston. La slipetoj estis konfiskitaj. La nekonata fremda lingvo ŝokis la gardiston: eble tio prezentas specialan sekretan lingvaĵon de la malbenitaj politikuloj... La kamarado estis sendita en la specialan punlokon kun severega reĝimo, nomata „karcerejo“. Bone, ke eĉ post la puno nia k-do ne malesperiĝis kaj daŭre lernis Esperanton, sed estiĝis pli atentema al la gardistoj.

Sub la reĝimo en Plovdiv ni ĉiutage spertis arbitraĵojn, ĉu de la gardistoj, ĉu de la soldatoj, deĵorantaj gardostare. Sed malgraŭ tiu ege streĉa atmosfero ni ne ĉesis okupiĝi pri organiza, politika, kultur-kleriga laboro.

Post unu jaro oni denove revenigis nin al Burgas. Tie ni daŭrigis la instruadon de Esperanto. Mi instruis laŭ la rekta metodo, sen lernolibro kaj vortaro. La kursanoj komencis paroli ekde la unua leciono. Komence

en tre elementa formo, sed iom post iom ili alkutimiĝis fari pli komplikajn konversacion. En mia instrulaboro helpis tre bone la sperto, kiun mi havis de la amasaj laboristaj Esperanto-kursoj en la sofia publika legejo „Hristo Botev“. Tie mi utiligis la lernolibron de la konata soveta aŭtoro S. Rubljov antaŭ ol aperis ĝia bulgara relaborita eldono de Asen Grigorov.

Foje oni demandis min: „Kial ni ne havigas al ni kajerojn por lerni la alfabeton kaj skribi en Esperanto?“ Mi respondis per renkonta demando: „Kiam vi lernis la bulgaran el la buŝo de via patrino, ĉu vi studis la alfabeton kaj skribis en kajero? Oni kontraŭargumentis: „Sed tiam ni ja estis infanoj!“ „Nu bone — mi respondis — kvankam aĝuloj, nun vi lernas laŭ la sama maniero...“

Tiu metodo, kiel sciante, helpas la kursanojn pli rapide superi la tiel nomatan „psikan barieron“ ĉe lernado de fremdaj lingvoj, kiam oni ne decidiĝas paroli pro timo ke faros erarojn. Mi tre ŝatas la paroligon de la kursanoj ekde la unua leciono, aplikante komence la komunan respondon al miaj demandoj kaj transirante laŭgrade al individuaj respondoj.

Ĉar multaj el la lernantoj estis laboristoj kun ege malvasta elementa klereco, duone forgesita post la lernejo, mi evitis surŝuti ilin per gramatikaj, regulo pri uzado de akuzativo k. a. (Cetere, al bulgaroj estas nekutima la uzado de kazoj ĝenerale, ĉar ili malaperis en nia lingvo jam antaŭ mil jaroj). Mi agis jenmaniere: analizante la frazon „La patro batas la filon“, mi klarigas, ke la filo suferas pro la bato kaj por konsoli lin ni aldonas la literon „n“ al la vorto „filo“. Sed se ni analizus la frazon „La filo batas la patron“, tiam „n“ iras al la vorto „parto“. Tiu primitiva analizo donis ideon al la kursanoj pri la esenco de tiu ĉi gramatika fenomeno, nomata akuzativo. Kaj praktike ili sukcese aplikis siajn konojn tiurilate.

Post Burgas oni transportis nin al Haskovo kaj de tie la sekvantan 1937-an jaron oni veturigis nin al la Centra malliberejo de la konata tekslaborista centro Sliven. Tie ni trovis 800 politikajn arestitojn, venigitajn el ĉiuj ceteraj malliberejoj de Bulgario. Inter ili estis ankaŭ esperantistoj. Ili alportis kelkajn esperantajn librojn, sintakson k. a. Miaj kursanoj konatiĝis kun iu sintakso kaj ridetante demandis min: „Kial vi ne tiel klarigis al ni kio estas akuzativo?“ Sed ili mem konstatis, ke eĉ ne konante la gramatikan terminaron, ili tamen korekte uzis la akuzativon.

En Sliven mi denove renkontiĝis kun Gorov kaj la ceteraj esperantistoj el Plovdiv. Laŭ iniciato de Gorov ni komencis eldoni esperantlingvan revueton en formo de kajero kun originalaj kaj tradukitaj materialoj. Ĉiu numero pasis de mano al mano, subtenante la

spiriton de niaj esperantistoj. Cu hazarde estas konservita iu numero de tiu revueto almenaŭ ĝis nun mi ne eksciis.

La prizena administracio post kelkaj monatoj decidis dividi la politikajn arestitojn en du grupojn: la gvidkamaradoj kun verdiktoj por pli longdaŭra malliberigo estis lokitaj en la suprajn etaĝojn de la kvinetaĝa grandega konstruaĵo. La ceteraj kamaradoj restis en la alia grupo, loĝanta la pli malsuprajn etaĝojn. Tiamaniere ni estis plene izolitaj unu de la alia. Oni celis izoli la pli nespertajn arestitojn de la ideologia influo kaj gvidado de la pli spertaj komunistoj. Kvankam estante en la sama malliberejo, ni havis nenian kontakton inter ni. La loĝantoj de la supraj etaĝoj estis nomataj „ideologoj“. Sed iu malklera gardisto ne povis korekte prononci tiun fremdan vorton kaj nomis nin „katalogoj“. . . Tio tre amuzis nin. Alia gardisto konstante atentis, ke neniu kantu. Aŭdinte el iu kelo melodion, li tuj ekkuras tra la koridoroj, demandante: „Kiu kantas?“ Ni nomis lin ŝerce „Kiu kantas?“ kaj entute forgesis lian nomon. . .

En la „ideologia“ grupo iu esperantisto ege ŝatis manifesti sian esperantistecon antaŭ la ceteraj kamaradoj. Ni loĝis en kontraŭaj

koridoroj, sed kiam oni amase direktiĝis al la korto por promenado, vidinte min li per plena voĉo kriis al mi: „Saluton, kamarado!“ La neesperantistoj amike ridetis al lia troa esperantista manifestigo. . . Post la forigo de la faŝisma diktaturo tiu k-do (Jordan Pavlov, „Sopa“) aktivadis en Plovdiv, estis prezidanto de la Kontrola Komisiono ĉe la Distrikta Komitato de BKP. Alte estimata de la pli junaj generacioj li forpasis antaŭ kelkaj jaroj en aĝo de pli ol 80 jaroj.

Se mi estus verkinta tiujn rememorojn ekzemple antaŭ tridek jaroj, certe mi povus citi pli multe da konkretaj kazoj kaj nomoj pri la temo „Esperanto en la malliberejoj“. Tamen post la liberigo de la lando ni ĉiuj okupiĝis pri streĉa konstrua laboro sur diversaj frontoj: ekonomia, politika, ideologia ktp. La laboro tiel englutis nian tempon, ke eĉ penso pri verkado de rememoroj ne venis al niaj kapoj dum la unuaj plej malfacilaj jaroj, kiam oni devis eltiri la patrolandon el la abismo de katastrofo. Tial venis tre malfrue tiuj rememoraĵ skizoj, kiuj eble prezentus certan intereson por la novaj esperantistaj generacioj, nekonantaj propraspekte la teruron de la malbenitaj faŝismo kaj kapitalismo.



Heroa
pasinteco

CALO PANOV PELTEŠKI

(Okaze de la 70-a datreveno de lia naskiĝo)



Dum la Civitana Milito en Hispanio (1936—1939) preskaŭ kvincent bulgaroj batalis en la vicoj de la Internaciaj Brigadoj helpe al la defendantoj de la respubliko kontraŭ la puĉorganizanto Franko, kiu estis subtenata de italaj kaj germanaj faŝistaj armetrupoj.

Unu el tiuj heroaj batalantoj estis la panlaboristo-esperantisto Calo Panov Pelteški. Sur la muro de lia naskiĝdomo en urbo Ugarčin, distrikto de Loveĉ, estas memortabulo. El ĝi oni informiĝas, ke li naskiĝis la 12-an de januaro 1912 kaj pereis tragike la 10-an de julio 1943.

Lia frato Blagoj rakontas:

„Calo estis nur trijara knabeto, kiam ni ĉiuj gefratoj orliĝis. Nia patro mortis kaj pri ni zorgis nia bona patrino. . .“

Li ne longe povis viziti lernejon, ĉar devis labori kaj zorgi pri sia vivtenado. Sed la soifo al lernado ne forlasis lin. Li multe legis, ellernis ankaŭ Esperanton kaj korespondis kun multaj esperantistoj el fremdaj landoj. Tiutempe li orientiĝis al la batalo por homa fratiĝo kaj interkompreniĝo, ekiris la vojon de batalanto por la libero.

En 1929 li laboras en Hungario kiel ĝardenisto. La sekvan jaron li revenas Bulgario kaj laboras en v. Kozloduj kiel komerc-laboristo. Tiam li aliĝas al la laborista organizaĵo. En 1932 Pelteŝki soldatservas, poste forveturas labori en Jugoslavio. Baldaŭ li revenas en sian patrolandon kaj kvalifikigas kiel panlaboristo.

En la komenco de la Civitana Milito en Hispanio Calo Pelteŝki estiĝas ano de Internacia Brigado kaj forveturas al Hispanio. Kiel leŭtenanto (rotestro) li heroe batalas kontraŭ la faŝistaj trupoj kaj estas grave vundita ĉe rivero Hrama. Savas lin alia bulgara interbrigadano Ilija Monov, kiel atestas en sia elsendo pri tiuj eventoj la Bulgara Radio. Malgraŭ la multaj viktimoj kaj vunditoj oni tamen savis la ĉefurbon Madrido.

Post la tragika fino de la bataloj por la

Hispana Respubliko la resaniĝinta Calo, la sofia esperantisto Nikola Mladenov kaj aliaj interbrigadanoj transpaŝas la francan landlimon. Oni arestas ĉiujn kaj tenas ilin en koncentrejojn en Francio dum la jaroj 1939—1941.

Fine Pelteŝki revenas Bulgario, vizitas por kelkaj tagoj sian patrinon kaj la gefratojn kaj poste forveturas al Sofio.

En 1943 li iras al la partizanoj kaj estas elektita komandanto pro lia militsperto. Tamen post kelkaj monatoj sekve de perfido Calo estas kaptita de la polico, ege kaj longe turmentita, sed li ne perfidis siajn batalkamradojn. De Sofio oni veturigas lin al la malliberejo de Skopje. La 10-an de julio 1943 oni murdis tiun heroan filon de kontraŭfaŝisma Bulgario. Sed en la memoro de sia brava popolo Calo Pelteŝki restos por ĉiam.

Jordan ATANASOV

SUKCESA PORPACA KAMPANJO

Dimitar HADJIEV,
prezidanto de la Bulgara MEM-komitato

ПЛАН ЗА МИР И РАЗОРЪЖАВАНЕ

Обръщение на повече от сто хиляди българи

ОВЕДИНЕНИ НАШИИ, 2
м (Кор. на БТА) — В ООН,
като заснован втората спе-
циална сесия на Общото съб-
орание на ООН по разоръжаване-
то, се състои церемония,
в която председателят на бъл-
гарското дружество за ООН
д-р Христо Арнауд обръща-
не за мир и разоръжаване с
адиксите на повече от 103
хиляди души съгражданини, съб-
рани по инициатива на Бъл-
гарския есперантски съюз и
Българския комитет на светска
то есперантско движение за

мир.
Приемайки обръщението, по-
мощник-генералният секретар
на ООН и директор на Цен-
тра на ООН по разоръжаване-
то Ян Мартенсон изказа за-
вешението на обществената дей-
ност за мир и против разоръ-
жаването. Той изказа „при-
вързаността към мира, съ-
трудничеството и раздразна-
не, което България и българи-
ското правителство доказват с
древоса си в работата на
ООН“. Това ни насърчава в
нашата дейност, подчерта той.

En la sama numero de „BE“ estis publikigita la teksto mem de la Alvoko kaj informo pri la unuaj rezultoj de la kampanjo. La lasta ĝojiga informo estas de majo 1982 — 103 353 subskriboj, kolektitaj de ĉirkaŭ 60 E-societoj en pli ol 200 loĝlokoj de la lando. Tiu ĉi nombro inkluzivas ankaŭ 12 subskribojn, kolektitajn de la E-klubo en u. Satka-3, Ĉe-ljabinsk-regiono, Sovetunio.

Iuj E-societoj organizis la kampanjon tre bone en intima kunlaborado kun la lokaj pacdefendaj komitatoj kaj aliaj sociaj organizaĵoj kaj kolektis subskribojn de granda parto de la loĝantaro en siaj loĝlokoj. Tiaj estas la E-societoj „D-ro L. Zamenhof“ en u. Razgrad (33 000 subskriboj), „Marek“ en u. Stanke Dimitrov (7207 subskriboj), „Fristo Kozlev“ en u. Polski Trambes (6584 subskriboj), „Espero“ en u. Gorna Orjahovica (5972 subskriboj), „Ivan Vladkov“ en u. Drjanovo (5411 subskriboj), „L. L. Zamenhof“ en u. Dve Mogili (2952 subskriboj), „D-ro Zamenhof“ en u. Stambolijski (2800 subskriboj), „Espero“ en u. Blagoevgrad (1455 subskriboj), „Georgi Dimitrov“ en u. Dimitrovgrad (1218 subskriboj). La E-societo de medicinistoj „D-ro Zamenhof“ en Sofio kolektis 1339 subskribojn de profesoroj kaj studentoj de la Supera Medicina Instituto en Sofio. Generale nur en Sofio estas kolektitaj 24 411 subskriboj.

En la kampanjo partoprenis ankaŭ kelkaj apartaj personoj, kiuj solaj kolektis grandan nombron da subskriboj, kiel Nadejda Cip-

En n-ro 8—9/1981 de „Bulgara Esperantisto“ estis publikigita Alvoko de la Centra Estraro de Bulgara Esperantista Asocio kaj de la Bulgara Komitato de Mondpaca Esperantista Movado (MEM) al ĉiuj organizitaj kaj neorganizitaj esperantistoj kaj al la amikoj de la Internacia Lingvo Esperanto en Bulgario meti siajn subskribojn sub la Alvoko de la Kvakera Esperanto-Societo en Londono subtene al la decidoj de la Unua Speciala Seso de la Generala Asembleo de UN pri Malarmado, okazinta en 1978 en Novjorko.

Iakova el Sofio, kolektinta 16 225 subskribojn, el ili 14 101 en Sofio kaj 2124 en 6 loglokoj en la regiono de Kazanlak, Petko Arnaudov, sekretario de DE de BEA en u. Pazargik — 1214 subskriboj, Ivan Dačev Ivanov el Sofio — 1151 subskriboj, Zahari Ivanov, vicprezidanto de la Bulgara MEM-komitato — 612 subskriboj, kolektitaj en u. Momin Prohod k. a.

La rezultoj tamen povus esti pli bonaj, se la estraroj de multaj E-societoj ne estus subtakstintaj la gravecon de la kampanjo.

Pri la rezultoj de tiu ĉi porpaca iniciato estis informita la tuta bulgara socio. La centraj ĉiutagaj gazetoj „Rabotničesko Delo“ (organo de CK de la Bulgara Komunista Partio), „Zemedelsko Zname“, „Trud“ kaj „Narodna Mladež“ en siaj numeroj de la 3-a de julio 1982 publikigis korespondadojn de la korespondanto de Bulgara Telegrafa Agentejo en Novjorko pri la ceremonio por prezento dum la Dua Speciala Sesio de la Generala Asembleo de la subskriboj al s-ro Jan

Martenson, vic-general sekretario de UN kaj Direktoro de la Centro de UN pri Malarado fare de la prezidanto de la Bulgara Societo pri UN Krum Hristov. (La saman korespondadojn publikigis ankaŭ revuo „Bulgara Esperantisto“ en sia numero de julio de la kuranta jaro). Pri la ceremonio informis ankaŭ la Bulgara Radio kaj la Bulgara Televido en siaj elsendoj je la 2-a de julio j. k.

La ceremonio por prezento de la subskriboj ĉeestis prof. Humphrey Tonkin, eksprezidanto de UEA kaj reprezentanto de UEA ĉe UN, kiu faris tre valoran paroladon (la tekston de la parolado legu ĉi-subel).

La sukceso de la kampanjo estas nova konvinka pruvo, ke la bulgaraj esperantistoj estas aktivaj batalantoj por malarado, por paco kaj amikeco inter la popoloj.

En la nomo de CE de BEA kaj de la Bulgara MEM-komitato mi esprimas profundan dankon al ĉiuj estraroj de la E-societoj kaj al la unuopuloj, kiuj aktive kontribuis por la sukceso de la kampanjo.

La parolado de prof. Tonkin en UN

Novjorko, la 1-an de julio 1982

Sinjoro Vica Generala Sekretario, Sinjoro Ambasadoro, Gesinjoroj.

Kun granda plezuro, kiel reprezentanto de la Universala Esperanto-Asocio, mi partoprenas, kune kun la Prezidanto de la Bulgara Asocio pri Unuiĝintaj Nacioj, en prezento al la Speciala Sesio pri Malarado, de la Generala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj, de pelskribo subskribita de pli ol centmil bulgaroj, kiu alvokas al abolicio de armiloj de amasa detruado kaj la redirekto de milita elspezado al la eliminado de matriĉeco.

Tiu pelskribo reprezentas la klopodojn de la Esperanto-Asocio de unu lando en tutmonda kampanjo organizita de la Kvakera Esperanto-Societo.

La Kvakera Esperanto-Societo intime kunlaboras kun nia Asocio, laŭ aparta kontrakto, pri temoj komune interesaj. La Bulgara Esperantista Asocio estas nia bulgara aliĝinta asocio. Ni gratulas niajn du fratajn organizojn pro tiu ĉi notinda iniciato.

Nia Asocio estas neŭtrala kaj senpartia pri politikaj kaj religiaj demandoj. Ni prenas nenian pozicion pri la apartaj politikoj de apartaj registaroj. Tamen, ni estas organizo, kiu ĝisfunde defendas, laŭ nia statuto kaj nia laborprogramo, homajn rajtojn kaj fundamentajn liberecojn kaj la antaŭenigon de

harmoniaj internaciaj rilatoj. La rajto vivi kaj libereco el milito estas inter la plej bazaj el ĉiuj rajtoj kaj liberecoj. En tiu spirito ni aliĝas al prezento de la pelskribo.

Nia Asocio kredas, ke daŭra paco kaj la fino de milito postulas interkomprenigon kaj dialogon inter homoj el ĉiuj nacioj en spirito de egaleco. Sen dialogo kaj interkomprenigo ne eblas la fino de milito, la fino de matriĉeco, malsano, senscio. Pro tiu kialo ni laboras por akcepto de unusola neŭtrala lingvo por internacia komunikado. Per tiu lingvo la Kvakera Esperanto-Societo lanĉis sian apelacion. La Bulgara Esperantista Asocio aŭdis tiun apelacion trans la lingvaj bariloj, kaj, kune kun multaj aliaj personoj en multaj aliaj landoj de multaj politikaj konvinkoj, agis laŭe. La rezultoj staras antaŭ vi hodiaŭ. Ni estas fieraj pri tiu ĉi drameca pruvo pri la efikeco de Esperanto kiel forto por la monda paco.

Kiel neregistara organizo en konsultaj rilatoj kun Unuiĝintaj Nacioj kaj Unesko, ni salutas la Specialan Sesion pri Malarado kaj ni solidariĝas kun homoj de bona volo en ĉiuj mondopartoj en nia deziro, ke ĝi spertu sukceson en siaj esencaj kaj urgaj laboroj.

Humphrey TONKIN
Antaŭa Prezidanto de Universala Esperanto-Asocio, Reprezentanto de UEA ĉe Unuiĝintaj Nacioj

SENLAĈA PACBATALANTINO



Kompreneble, neniu el ni — ĉiaj geamikoj kaj gekonatoj povus kredi, ke tiu ĉi senlaĉa, vigla, laborema E-aktivulino estas 80-jara. Ja eĉ ŝia hararo ankoraŭ ne estas blankiĝinta!

Nadejda Ciplakova naskiĝis antaŭ 80 jaroj en urbo Kazanlak en progresema familio. Jam kiel lernantino kaj poste kiel fraŭlino kaj patrino de du knaboj, Nadja partoprenas en diversaj kultur-klerigaj aranĝoj — amuziĝoj, prezentado de teatraĵoj, prelegoj k. a. kun lernantoj kaj kolegoj en la modela legejo „Iskra“ (Fajrero) en Kazanlak. En 1921 ŝi finas la urban pedagogian gimnazien kaj la saman jaron fariĝas instruistino en la elementa lernejo de vilaĝo Gorno Paniĉerovo. La klasĉambro kie Nadja instruis estis iama butikoj, sen lerniloj kaj mebloj, nur kun nigra tabulo.

La sciama instruistino finas dujaran pedagogian instituton kaj du jarojn instruas en v. Dolno Sahrane. Tie ŝi klerigas kaj edukas ne nur infanojn, sed ankaŭ vilaĝanojn per prelegoj, referaĵoj, prezentado de teatraĵoj en la loka legejo „Ivan Vazov“. Progresemaj gekolegoj kunvenadas en la loĝejo de Nadja Ciplakova kaj pridiskutas politikajn kaj aliajn problemojn.

Post 1944 ŝi transloĝiĝas en Sofion. Kvan-kam ŝi konatiĝas kun Esperanto jam en la 20-aj jaroj kaj vizitas la bulgaran E-kongreson en Varna en 1926, nur en 1965 Ciplakova serioze eklernas la lingvon. Ŝi konatiĝas kun sofiaj esperantistoj kaj fariĝas aktivulino de la Sofia E-societo „Maksim Gorki“. Kaj en ĉiuj aktivecoj Ciplakova ĉiam estas en la unuaj vicoj, oni ĉiam laŭdas kaj premias ŝin per atestiloj, diplomoj k. a. Ŝi fariĝas sekretario de „M. Gorki“, sekretario de la Turista E-Sekcio, kunfondinto de la Sofia E-floro kaj ĝia regula membro.

Nadja Ciplakova aktive eklaboras por malpermeso de la danĝeraj armiloj. Ŝi komencas kolekti subskribojn kontraŭ la minacanta la homaron milito. Ciplakova vizitas magazenojn, malsanulejojn, lernejojn, agitante kaj kolektante centojn da subskriboj. Kaj la homoj volonte subskribiĝas sur la folioj, ĉar ili malamas la militon. Ŝi vizitas ankaŭ urbojn kaj vilaĝojn — en la distrikto de Stara Zagora.

La senlaĉa kaj persista pacbatalantino Nadejda Ciplakova kolektis pli 16 225 subskribojn de pacamaj civitanoj, esprimintaj tiamaniere sian akran proteston kontraŭ la militincitanoj, por trankvila kaj feliĉa vivo de la homaro, por paco kaj progreso.

Brave al nia fidela samideano, nobla esperantistino kaj homo Nadejda Ciplakova! Okaze de ŝia 80-jariĝo ni gratulas ŝin kaj bondeziras al ŝi sanon, vignecon kaj pluan aktivadon en nia E-movado.


Ivan KEREMIDĈIEV-ESPEROV

URĜA KURACISTA ALVOKO AL LA MONDO

En aprilo ĉi-jare en Cambridge (Anglujo) okazis la Dua Tutmonda Kongreso de la Internacia Kuracista Movado por malebligo de la atommilito. La partoprenantoj en la kongreso sendis leterojn al la usona prezidento R. Reagan kaj al la ĝenerala sekretario de CK de Sovetunio Leonid Breĵnev. Krome oni proklamis alvokon al ĉiuj kuracistoj en la mondo kaj alvokon al la partoprenantoj en la Dua Ekstra Sesio de UN pri malarmado. Kernoj de ĉiuj ĉi dokumentoj

estas jenaj konkludoj de la elstaraj kuracistoj kaj specialistoj pri sanprotektado el 31 landoj de la mondo:

1. La atommilito fariĝus katastrofo por la civitanoj de ĉiuj landoj, kontraŭ kiuj oni tiujn atomarmilojn uzus. En la atakitaj landoj tuj post la atako pereus milionoj da homoj. Milionoj da aliaj pereus en landoj, kiuj ne estas trafataj rekte. Dum posta kaoso fakte



Junaj geamikoj,

Ni bondeziru, ke la flugantaj vortoj de la devizo de la Asembleo — „Unueco, Kreado, Beleco“ estigu via gvid-principo por forigo de la baroj inter landoj kaj popoloj, por interkonatiĝo kaj interkompreniĝo, por kunlaborado kaj amikeco!

(El la salutparolo de Todor Jivkov,
prezidanto de la Ŝtata Soveto de Popola
Respubliko Bulgario, al la partoprenantoj en la
Dua Internacia Asembleo „Standardo de la Paco“)

Denove sonas pacaj infanaj sonoriloj!...

Sofio ree estigis ĉefurbo de la juneco de nia planedo: infanoj kaj junuloj el pli ol cent landoj venis kaj ĉirkaŭprenis unu la aliajn en la nomo de la amikeco kaj la espero pri kreo de nova mondo de beleco kaj interkompreniĝo. Feliĉaj ridetantaj infanoj — iliaj voĉetoj tintis en la stratoj kiel la sonoriletoj de la Monumento „Standardo de la Paco“.

La iniciatintino de tiu ĉi grava internacia arango — la neforgesebla Ljudmila Jivkova ne plu estas inter ili, sed ŝia nomo por ĉiam estos ligita kun tiu granda monda movado de la infanoj. Siaj ideoj pri multflanka evoluo de la homa personeco enkorpiĝis en la farojn de la junaj kreantoj. Sur la asfalto antaŭ la Nacia Palaco de Kulturo ekfloris la pentraĵoj de junaj talentaj pentristoj. En la salonoj de la Palaco de Junpioniroj eksonis la kantoj kaj muzikaj plenumoj de la junaj muzikistoj; eksonis versaĵoj, kiuj pri-kantis la volon de la junaj civitanoj de l' mondo vivi kaj kreadi en paco.

Ilian noblan laboron inspiris ankaŭ la ĉeesto de eminentuloj el diversaj landoj: la ĝenerala direktoro de UNESKO s-ro Amadu Mahtar M'Bou, la direktoro de UNICEF s-ino Aida Gindi, la soveta verkisto Sergej

Mihalkov, la japana aktorino Mariko Mi-jagi k. a.

La infanoj-esperantistoj ankaŭ aligis siajn voĉetojn al la internacia ĥoro de la Asembleo. Tio estas la unua fojo, kiam E-grupo havis eblecon partopreni en tia granda iniciato porinfana. La ideo pri ties aligo renkontis varman akcepton ĉe la bulgara esperantistaro. Ĝi estis pozitive pritaksita de la direktoro de la Centro „Standardo de la Paco“ Vladimir Jivkov kaj de la ĝenerala sekretario de la Komitato de Kulturo Stefan Ganev. Kvankam iom malfrue, komenciĝis vigla preparlaboro de kolektivoj kaj de individuaj plenumantoj el diversaj regionoj de la lando sub la sperta gvidado de nia elstara kantartistino Maria Angelova. La tempo tute ne sufiĉis, sed la impeto, la ambicio prezenti sin kiel eble plej alt-nivele kaj artisme superregis. Niaj junaj artistoj sukcesis prepari riĉenhavan muzik- kaj deklamprogramon.

En la salono de la Interklubo en la studenta urbeto la 17-an de aŭgusto matene la infanoj-esperantistoj prezentis sian programon. La prezentado „La mistera hipopotamo“ de la Ŝtata Pupteatro el urbo Kargali elvo-



La karmemora iniciatintino de la Asembleo — Ljudmila Jivkova inter infanoj.

kis multajn emociojn ĉe la junaj spektantoj. La bona enscenigo, la belegaj pupoj kaj la perfekta lingvoscio faris la spektaklon facile komprenebla eĉ por la neesperantista publiko, kiu estis ravita de tiu altnivela plenumo.

La prezentadon ĉeestis la infanaj delegitaroj el Belgio, Nederlando, Hungario kaj Afganio, kiuj esprimis sian grandan admiron.

NAGIBA (Afganio) — 10-jara:

— Mi ne komprenas Esperanton, sed ĉio ĉi estis belega! La bestojn-aktorojn unuigis la amikeco, k u ankaŭ devas unuigi ĉiujn infanojn en la mondo. La lingvo estas tre belsona, ĝi ege plaĉis al mi kaj mi havas deziron ĝin lerni.

Al la vortoj de Naĝiba aliĝis la gvidanto de la delegitaro — s-ro SAFI, direktoro de la Centra Junpionira Domo en Afganio:

— Unuan fojon mi aŭdis pri Esperanto kaj post mia reveno en Afganion mi detale ekinteresigos pri ĝi.

La beloj diris, ke ili eksentis la Internacian Lingvon proksima al la franca kaj facile komprenebla, dank'al kio ili bone komprenis la enhavon de la pusppektaklo. La nederlandanoj laŭdis la aktoran ludon, ĉar ĝi vere helpis kompreni la ideon de la prezentado.

La saman vesperon, en la salono de Popola Legejo „Emil Sekerĝijski“ niaj etaj E-aktoroj donis spektaklon por la sofia esperantistaro.

Ravis la publikon per siaj plenumoj Marlena Kjorovska el Stara Zagora kaj Milen Makedonski el Pleven; kortuŝe kantis la plej juna, aktoro la 6-jara Stajo el Mihajlovgrad. La ĉeestantoj longe aplaudis la bonajn plenumojn de la reprezentantoj el Sofio, Petriĉ, Targoviŝte, Mihajlovgrad kaj Stara Zagora. La bulgara radio kaj televido elsendis raportaĵojn kaj intervjuojn pri la partopreno de talentaj infanoj-esperantistoj en la Asembleo.

La unua esperantista partopreno en la Asembleo „Standardo de la Paco“ estis sukcesa malgraŭ la malfrua komenciĝo de la preparlaboroj. Feliĉe, venkis la sindonemo, la ambicio kaj la amo al Esperanto! . .

Kalinka VASILEVA

AMIKECO INTER LA INFANOJ

MERLENA DIMITROVA, lernantino

Ĝojon, feliĉon infanoj deziras,
regu en mond' amikeco!

„Ne!“ al milito firme ni diras,
estu la suna brileco!

Ni, la infanoj de kvin kontinentoj,
arde la pacon ekamu!

Rozoj en kampoj de ni deŝiritaj,
teron amike ornamu!

Ĝojon, feliĉon infanoj deziras,
regu en mond' amikeco!

Per junaj helaj revoj oni spiras
dum senzorga infaneco.

Tradukis: Rene JORDANOVA

SONORILEGOJ

LILJANA JABANGIEVA

Ĉe Vitoŝa sonorilegoj
sonoras kaj brilas kiel sunoj.
En ili briletridantaj
vidiĝas vizaĝoj infanaj.

Kaj kantas la sonorilegoj,
lumetoj al ĉielo disigas;
respondas al ili montpintoj,
multjaraj arbaroj vekigas.

Ĉe Vitoŝa sonorilegoj
sonoras. La kantoj flugantaj
ĉirkaŭas la tutan terglobo,
venintaj de kvin kontinentoj.

Tradukis: Dimitar DENĈEV

„NI SERĈAS INFANAN E-PUBLIKON!“

Anstataŭ vizitkarto: la Stata Pupteatro el urbo Kargali estigis konata al la internacia kaj bulgara E-publiko per sukcesa realigo de la teatraĵo „La mistera hipopotamo“ de la sovetaj aŭtoroj Lifšic kaj Kiĉanova. Tio ĉi estas teatrospektaklo, destinita por infana publiko, en kiu oni denove traktas la eternan temon pri amikeco kaj kamaradeco.

Certe niaj legantoj memoras, ke en la fino de la pasinta jaro ni informis ilin pri la granda sukceso de la aktoroj el Kargali ĉe la XIV Internacia Festivalo de Pupteatroj en Zagreb, kie per „La mistera hipopotamo“ ili sukcesis gajni la tri unuajn premiojn malgraŭ la forta konkurenco de E-teatroj el Sovetunio, Rumanio, Pollando, Hispanio kaj Jugoslavio.



Sceno el „La mistera hipopotamo“

La enscenigon de la teatraĵo realigis la reĝisorino Maria Jankova, la scenografion — D. Nikolova kaj la tradukon — Belka Beleva. Originale plenumas siajn rolojn la aktoroj Stojan Angelov (la ĝirafino onklo Zora, la leporo Konstantin kaj la pavo Pavel), Conka Toĉeva (la hipopotamido Borja), Rumjana Stefanova (la leonido Lev), Nadejda Nikolova (la simio Maŝa), Angel Stankov (la bradipo Lenja), Petko Danev (la kroko-

dilo Kirilo) kaj Uljana Coneva — asistantino de la aktoroj, kiu helpas al ili ĉe movado de la pupoj.

La aktoroj estas ankaŭ aktivaj membroj de E-societo „Stelo“ en Kargali.

Agrabla surprizo en la programo de la interkonatiga vespero de la ĉi-jara XV Nacia Revuo de la E-Kanto kaj Parolo en Pleven estis ankaŭ la spektaklo „La mistera hipopotamo“. Konsiderinda parto de la publiko estis infanoj, sed nur malmultaj el la etaj spektantoj komprenis Esperanton. La pli aĝaj spektantoj tradukis al ili, sed la infanaj reakcioj dum la spektaklo kompreneble malfruiĝis. Ne estas necese diri, ke multajn lingvajn senconuancojn ili tute ne komprenis.

— Ja tio ĉi estas nia problemo — diris post la spektaklo la direktorino de la teatro Ira Vlahova. Ni havas la ambicion trovi rekonon kiel esperanta teatro, kaj ni serĉas infanan E-publikon. Bedaŭrinde, nur malmultaj infanoj nun posedas la Internacian Lingvon.

— Ni decidis kombini la pupteatron kun la Internacia Lingvo. Nin entuziasmis nia amiko kaj multjara esperantisto Hristo Kezelev — rakontas en la nomo de siaj kolegoj Stojan Angelov. — Kvar monatojn ni lernis la lingvon kaj nur poste ni komencis labori sur la teatraĵo. Post la sukceso en Zagreb ni ne forlasis la Internacian Lingvon. Kompreneble, en la komenco estis malfacilaĵoj, kiam ni parolis kaj improvizis en Esperanto, des pli ke ni ludas sen sufloro. Kaj dum la spektaklo ni ne devas forgesi ankaŭ pri la sceneja plastiko. En Zagreb la juna japanino Mika Vaseda — membro de la Internacia Lingva Jurio, venis sur la scenejo kaj komencis paroli al mi. Tiam ni ankoraŭ ne povis paroli libere en Esperanto. Ŝi turnis sin al Belka Beleva kaj demandis ŝin, kial mi ne respondas.

— Li estas ankoraŭ tre emociita — ŝi respondis.

— Mi memoras tiun ĉi momenton — ridetante diras Belka Beleva. — Kiel multjara esperantistino mi estas ĝoja, ke tiu ĉi relative juna teatra kolektivo gajnis sian unuan rekonon per Esperanto.

Kiel tradukistino de la teatraĵo mi ne celis demonstri miajn lingvajn konojn. Mi laboris kun la klara konscio, ke la teatraĵo estas destinita por infanoj. Sed ĉiuj malfacilaĵoj estas jam agrabla rememoro, ĉar nia laboro ne estis vana — la rezulto kontentigas nin.

Maria JANKOVA



LERNEJANA ESPERANTO-SOCIETO » VERDA RAKETO «

En la kadro de la ĉi-jaraj tradiciaj „Botev-Tagoj 82“, en urbo Vraca okazis kortuŝa jubileo de la unua en la lando lernejana Esperanto-societo „Verda Raketo“, fondita antaŭ 20 jaroj.

La salono de la legejo estis plenplena de lernantoj kaj eksaj membroj de la societo, partoprenantoj kaj gastoj de la Internacia Recitalo de Botev-poezio en Esperanto, multaj civitanoj.

Emocian raporton pri la 20-jara aktivado de la societo faris ĝia fondinto kaj merita lektoro de Esperanto BOJCO MLADENOV.

„En 1962 mi partoprenis la XIII kongreson de la Tutmonda Astronaŭtika Federacio en „Oraj Strandoj“ apud Varna — diris B. Mladenov. — Ankoraŭ tiam, renkontinte mian esperantan amikon prof. d-ron Folrad Hapah, en kies kompanio mi estis dum tuta semajno, mi decidis komenci la instruadon de Esperanto en la gimnazio. Des pli ke la sekvantan jaron Vraca devis bonvenigi la junajn delegitojn de la XIX Universala Kongreso de TEJO. Dum la lernojaro 1963–64 mi enkondukis Esperanton kiel fakultativan studobjekton en unu nuran klason — unufoje en la semajno. Pli ol 100 gelernantoj el IX, X, kaj XI klasoj de la politeknika mezlernejo „Hristo Botev“ lernis Esperanton. Ili

mem proponis la nomon de la unua en nia lando lernejana E-societo — „Verda Raketo“. La entuziasmo estis garantio pri sukceso kaj ĝi ne malfruigis: la membraro de la societo rapide plimultiĝis, en ĝiajn vicojn venis lernantoj el aliaj klasoj kaj mezlernejoj.

Dum nia 20-jara ekzistado la lernejana E-societo „Verda Raketo“ akiris gravajn sukcesojn. Pli ol 500 gelernantoj partoprenis diversajn esperantajn kongresojn, konferencojn, seminariojn, festivalojn, laborbrigadojn kaj aliajn arangojn en la lando kaj eksterlande. Gastis al la societanoj dekoj da esperantistoj el proksimaj kaj malproksimaj landoj: el Japanio, Sovet-Unio, Hungario, Jugoslavio, Usono, Finnlando kaj el multaj aliaj landoj.

„Verda Raketo“ posedas eble unikan en la mondo memorlibron kaj bele aranĝitajn albumojn. En pli ol 70 landoj jam estas bone konataj la reklamaj materialoj, produktitaj laŭ iniciato kaj per monrimedoj de la societo: 5 milionoj da alumetskatoletoj, 50 000 glumarkoj kun la emblemo de la societo, miloj da kalendaretoj, specialaj korespond-kovertoj, plastikaj tekoj, insignoj kaj trikotbluzoj — ĉiuj portantaj la societan emblemon de „Verda Raketo“.

El la vicoj de la societo eliris elstaraj lektoroj de Esperanto, laŭreatoj en naciaj kaj internaciaj E-festivaloj kaj recitaloj.

Dum tutmondaj E-kongresoj la societo multfoje estis prezentata kiel imitinda ekzemplo.

Pro la multflanka fervora aktivado de la societanoj kaj de la sindona kaj arda propagandisto de la Internacia Lingvo Bojco Mladenov la estraro de Bulgara Esperantista Asocio distingis lin per la Ora Insigno de BEA kaj per la titolo „Merita lektoro de Esperanto“ kaj premiis lin per partopreno en la Universala Kongreso de Esperanto en Antverpeno ĉi-jare je kosto de la Asocio. La urba Konsilantaro pri Kulturo en Vraca premiis societon „Verda Raketo“ per la sumo de 500 levoj kiel monhelpo por ĝia plua aktivado.

La redakcio de „Bulgara Esperantisto“ gratulas la anojn de „Verda Raketo“ lige kun la 20-jara jubileo de la societo kaj bondeziras al ili novajn sukcesojn en la popularigo de Esperanto kaj de nia socialisma patrolando en la tuta mondo.

Donco HİTROV



Gratulojn por la fondinto de „Verda Raketo“
Bojco Mladenov



EN ANTVERPENO LA BULGA- ROJ ESTIS LA PLEJ AGEMAJ!...

Trian fojon Antverpeno estigis ĉefurbo de UEA-kongreso (1911, 1928 kaj 1982). Eble pro la gastamo de ĝia loĝantaro, eble pro la tradiciplena multjara E-movado en Belgio kaj precipe en la flandra parto de la lando? Jam en 1902 la esploristo Charles Lemaire fondis la monatan revuon „Belga Sonorilo“, kiu multe kontribuis al rapida fondiĝo de grupoj en diversaj urboj de la lando. Lemaire fariĝis la unua prezidanto de la Reĝa Belga Ligo Esperantista (RBLE), kiu estis fondita en 1905.

Malmulte informite pri industrie evoluinta Belgio, pri ĝia historio kaj pri la malnova Antverpeno — unu el la plej grandaj en la mondo ŝiphavenoj kaj centro de la diamant-industrio — mi elvagoniĝis sur la kajon de la Centra stacidomo „Diamanto“ en Antverpeno.

Bonŝance la kongresejo estis proksime de la stacidomo — en la zoologia ĝardeno!... Serĉemuloj tuj faris iom ironian komparon: la bestoj eble ankaŭ havas „internacian“ lingvon kaj tute trafe esperantistoj kongresos en ilia kompanio!...

Tamen — neniam signo pri okazigo de Universal E-kongreso: neniam flagoj, neniam afiŝoj!... Eble pro la modesteco de la dommastroj, eble pro tradicia flandra kutimo senbrue okazigi eĉ internaciajn aranĝojn?

Sed la konata kaj kara kongresa etoso ĉirkaŭis nin. Neniajn pliajn kritikajn rimarkojn!... Ni ekkongresis.

Gojaj renkontoj kun malnovaj amikoj kaj konatuloj; ardaj ĉirkaŭprenoj, kisoj, ridegoj... Longaj vicoj de diversaj ĝicetoj — por loĝigo, aliĝo, ekskursoj... Gaja amika etoso dum la interkona vespero: komunaj kantoj kune kun la Londona Esperanto-Horo; ekscitita babilado de glaso da fama belga biero en la aleoj de la zooparko... Evidentiĝis, ke en la varmaj kongresaj tagoj kaj vesperoj la proksimeco de la zooparko kun ĝiaj grandaj arboj kaj la aleoj kun multaj floroj ambaŭflanke disponigis al la kongresanoj agrablan freŝecon kaj sufiĉe da spaco por promenoj kaj intimaj interparoloj!

La solena inaŭguro de la 67-a Universal Kongreso de Esperanto, kies alta protektanto estis lia Reĝa Moŝto Balduino I de Belgio, okazis en la plenplena salonego „Zamenhof“ en ĉeesto de preskaŭ 3000 kongresanoj kaj gastoj sub la aŭspicio de s-ro Andries Kinsbergen — guberniestro de la Provinco Antverpeno, kaj s-ro Mathilde Schroyens — urbestro de Antverpeno. Ĝi estis vere impona solenaĵo! La prezidanto de UEA s-ro Grégoire Maertens prezentis al la kongresanoj la membrojn de la Honora Prezidio — la estraranojn de UEA, la prezidanton de LKK — deputiton Fernand Piot kaj la reprezentanton de UNESKO, ambasadoron Mustapha Masmaudi (Tunizio).

La ĉeestantojn forte impresis la paroladoj de la antaŭa prezidanto de UEA prof. Humphrey Tonkin pri la generaciaj aspektoj de la Esperanto-movado kaj de s-ro Mustapha Masmaudi pri Esperanto kaj la lingvaj problemoj en la nuntempa mondo, kiuj estis longe aplaŭdataj.

Dum la nacia arta vespero la dommastroj de la kongreso prezentis la riĉecon de la flandra folkloro: horo „Rundadinella“ kaj la popola artgrupo „Drieske Nijpers“ majstre plenumis flandrajn kantojn kaj dancojn, instrumenta trio guigis la publikon per alt-nivela plenumo de muzikaj verkoj de la antaŭklasikuloj.

La kongresanoj komencis sian aktivadon en diversaj kunvenoj de apartaj komisionoj, internaciaj organizaĵoj kaj aranĝoj. La kongresejo ekzumis kiel abelujo. La relative malmultnobra

GRUPO DA BULGA ROJ AKTIVADIS

en preskaŭ ĉiuj aranĝoj de la kongresa programo.


Kun granda intereso la partoprenantoj en la Internacia Kongresa Universitato aŭskultis la prelegon de prof. d-ro Kiril Popov pri la apliko en la medicinan praktikon kaj speciale en la ĥirurgion de unu el la plej novaj kuracrimedoj — la biologian histan cianakrilatan gluon. La lekcio estis akompanita de koloraj lumbildoj. La rektoro de IKU d-ro Wim M. A. de Smet alte pritaksis la lecion de prof. Popov, esprimante la opinion de ĉiuj partoprenantoj.

Unu el la plej amase vizititaj estis la kunveno de MEM, kies prezidanto Imre Pethes (Hungario) emociis parolis pri la plej grava tasko de la esperantistaro en la tuta mondo: la batalo por paco kaj malarmado kontraŭ la minaco de nuklea mondmilito, kiun obstine preparas la militemuloj en Usono kaj iliaj imperiistaj partneroj. Aligis sian voĉon al la parolado de I. Pethes ankaŭ la honora prezidanto de MEM Nikola Aleksiev, kiu arde subtenis la kaŭzon de la mondpaca E-movado. Li sciigis al la ĉeestantoj, ke antaŭ nelonge UEA kaj la Bulgara Asocio pri Unuiĝintaj Nacioj kune prezentis petskribon pri malarmado al UN, subskribita de 103 000 bulgaraj civitanoj. Tio ja estas la kontribuo de nur unu lando al la kampanjo lanĉita de la Kvakera Esperanto-Societo! La alvokon subskribis bulgaraj esperantistoj kaj simpatiantoj de Esperanto, kio estas grava kontribuo de la Bulgara Esperantista Asocio al la monda batalo por paco kaj malarmado.

La kunvenon gvidatan de nia samlandano Petar Todorov, estrarano de UEA pri faka agado, partoprenis reprezentantoj de preskaŭ ĉiuj fakaj organizaĵoj de UEA. Multaj bulgaroj aktive partoprenis la diskutojn lige kun la raportoj de P. Todorov kaj d-ro Otto Haszpra (Hungario) pri la scienca apliko de Esperanto kaj pri la agado de la Scienc-Esplora Centro en Budapeŝto. Pri la planoj de iliaj organizaĵoj lige kun la 100-jara jubileo de Esperanto kaj pri ilia agado parolis prof. d-ro Kiril Popov (UMEA), Donĉo Hitrov (prezidanto de ILEF), Draguŝko Petrov (IPTEA), k. a.

DOKUMENTA FILMO PRI ESPERANTO

La raport-elekta kunveno de la Internacia Ligo de Esperantistaj Foto-Kino-Magnetofon-Amatoroj (ILEF) kunvenigis en salonon „SCHOOFs“ ne nur la malnovajn membrojn de tiu organizaĵo, sed ankaŭ multajn interesigintojn pri tiuj modernaj rimedoj de informado kaj komunikado. La kunvenon partoprenis ankaŭ la rektoro de la Internacia Kongresa Universitato d-ro Wim M. A. de Smet (Belgio), la vic-prezidanto de TEJA d-ro Tadros Megalli (Egipto), Petar Todorov kaj aliaj eminentuloj de UEA — fervoraj foto-kino-amatoroj. La prezidanto de ILEF Donĉo Hitrov faris detalan raporton pri la agado de ILEF dum la pasintaj tri jaroj kaj substrekiis, ke la rezultoj estas kontentigaj: plimultigis la membraro de la organizaĵo, estas kreataj novaj naciaj ILEF-sekcioj ĉe diversaj landaj E-Asocioj, plivigliĝis la krea laboro de la membroj, kiuj partoprenas in-



ternaciajn foto- kaj filmkonkursojn kaj bonege sin prezentas. Estis elektita nova Estraro de ILEF (por trijara mandato) kaploke de la ĝisnuna prezidanto Donĉo Hitrov. La novaj estraranoj: Jos Fernandez Arroyo (Hispanio), Kaoro Asaoka (Japanio), Hans R. Schmidt (GDR) — estas elstaraj foto-kino-amatoroj, kiuj reprezentas diversajn regionojn de la mondo kaj kontribuos al la plua disvastigo de la agado de ILEF. La nova sekretario de la organizaĵo estas Jorĵeta Zdraveva (Bulgario).

En la nomo de la Estraro de ILEF Donĉo Hitrov sciigis al la ĉeestantoj du gravajn novaĵojn: La Estraro de UEA akceptas la proponon de ILEF pri kreo de longdaŭra filmo pri la 100-jara historio de Esperanto kaj aprobas la anoncintajn Internaciajn Foto-kaj Kino-konkursojn dum la venontjara UK en Budapeŝto je temo: „La folkloro arto — ponto inter la popoloj“. Tio ja estas grava rekono de la agado kaj la iniciatoj de ILEF — unu el la plej aktivaj fakaj organizaĵoj de UEA.

TEJA KAJ ILEF UNIĜAS

La kunvenon de la Tutmonda Esperantista Journalista Asocio (TEJA) partoprenis multaj bulgaroj — profesiaj kaj ne profesiaj ĵurnalistoj, kiuj eldonadas E-periodaĵojn kaj kunlaboras al naciaj eksterlandaj eldonaĵoj: Nikola Aleksiev — redakciano de „Internacia Ĵurnalo“, organo de TEJA, (kies vic-prezidanto kaj ĉefredaktoro estas Ivan Kere-midĉiev—Esperov), Violin Oljanov — ĉefredaktoro de revuo „Paco“ — organo de MEM, Kunĉo Valev — ĝenerala sekretario de BEA, Donĉo Hitrov — estrarano de TEJA kaj ĉefredaktoro de „Bulgara Esperantisto“ — organo de BEA, Minko Conkovski — redakciano de „Scienca Mondo“, Flori Nikolov, redakciano de „BE“, k. a. Tiu forta prezento de bulgaroj denove konfirmis la aktivadon de niaj samlandanoj en la kongresaj programeroj kaj arangoj.

En la ĉeesto de s-roj Olav Thormodsen (Norvegio) — prezidanto, kaj d-ro Tadros Megalli (Egipto) — vic-prezidanto de TEJA, la partoprenantoj aŭskultis informon de N. Aleksiev pri la ĝisnuna agado de la organi-

zajo kaj pri la eldonlaboro de la asocia organo „Internacia Jurnalisto“, kiujn li pri-taksis nekontentigaj. Post vigla pridiskuto de la informo estis faritaj celkonformaj proponoj por pliaktivigo de la kunlaborado al „I. J.“ kaj al la naciaj eldonaĵoj pri-kaj por-esperantaj. Donĉo Hitrov proponis unuiĝon de TEJA kaj de ILEF, „...ĉar — li sub-strekis — ne povas ekzisti nuntempa ĵurnal-istiko sen uzado de foto, kino kaj magne-tofono — la plej modernaj rimedoj de komu-nikado“. Estis decidite, ke ambaŭ organizoj unuiĝu kaj agu komune, konservante sian sendependecon kiel fakaj UEA-organizaĵoj. La asocia organo „Internacia Jurnalisto“ dis-ponigos kelkajn pagojn al ILEF — kiel ties tribuno pri la aferoj de la Ligo.

Tiu ĉi interkonsento grave kontribuos al la plivigliĝo de la agado de ambaŭ organizoj, kies membroj aŭtomate estiĝas B-anoj de TEJA kaj de ILEF kaj pagas nur unu jar-kotizon.

Simila unuiĝo de du fakaj E-organizaĵoj estas senprecedenca kaj multpromesa!

Preskaŭ ne estis komisiono aŭ organizaĵo, en kiuj bulgaroj ne partoprenis! Mi volas speciale emfazi la tre valoran kaj interesan prelegon de Belka Beleva en la Komisiono pri Virina Agado. En sia bonstila, emocia kaj konkreta raporto ŝi starigis la plej gra-vajn taskojn antaŭ la esperantistinoj el la tuta mondo: kreo de aktivaj kaj bone organizi-taj komisionoj, kiuj unuiĝu la fortojn de la virinoj por arda pachtalo; digna sinprezento de la virinoj en ĉiuj branĉoj de la socia vivo. Inter alie ŝi emfazis, ke tre grava estas la rolo de la virino-patrino, edukanta siajn in-fanojn kiel homojn kapablajn defendi la valoraĵojn de nia nuntempo.

Ankaŭ en la Kongresa Gazetara Servo estis bulgaroj, kiuj per siaj ĝustatempaj, profesie verkitaj korespondaĵoj kontribuis al la in-formado de la belga socio pri la kongreso kaj pri Esperanto, ĝenerale.

En la komuna loĝejo de la Nova Internacia Studenta Domo sur Provinciestraat 252 mi loĝis en dormĉambro kun 11 personoj el di-versaj nacioj (svedo, finno, belgo, du mal-tanoj, braziliano, polo, sviso, madagaska-rano, germano). En tiu „Malgranda Babilono“ oni parolis unu nuran lingvon, bonege kaj frate kondukis kaj interkompreniĝis! Ses el miaj samĉambranoj estis vizitintaj Bulgarion kaj entuziasme dividis siajn impresojn kaj sentojn pri nia popolo, pri nia patrolando. Ili ĉiuj citis nomojn de bulgaraj esperantis-toj, de urboj kaj vilaĝoj, de lokoj kaj mon-taroj! Ĉu ni ne fieru! Kvin el ili ekdeziris estiĝi libervolaj perantoj de „Bulgara Espe-



rantisto“ en siaj landoj. En niaj dumnoktaj babiladoj ili ĉiuj esprimis sian kontentecon de la bulgara ĉeesto en la kongresaj arangoj kaj speciale de nia partopreno en la Kongresa Arta Vesperto. Kaj ili tute pravis!

VIGLAJ APLAŬDOJ POR BULGARAJ KANTISTOJ

El sep programeroj de la Muzika Vesperto, okazinta en salono „Zamenhof“, kvar — la plej riĉenhavaj kaj longdaŭraj! — apartenis al la bulgaroj! Post la brilaj kaj elegantaj interpretoj de Kvarteto Arriaga (Belgio), de la ĉina kantistino Qiu Zimin kaj de la franca pianistino Françoise Chevré, la bul-garaj kantartistoj Veselin Damjanov kaj Pro-dan Prodanov emociigis kaj ravis la publikon per sia bonega interpreto de arioj el operoj kaj operetoj kaj de famaj kantoj. Ege agraba surprizo por ĉiuj en la salono estis la pro-gramo de la Bulgara Ĉambra Miksita Ĥoro sub la gvidado de la ĥorestro Dimitar Ter-ziev!

La ĥoristoj alportis en la salonegon la ĉarmon kaj la bonodoron de la Roza Valo, la majestecon kaj la freŝecon de bulgaraj montaroj, la bonkoran animon kaj ribeleman spiriton de la bulgaroj. Preskaŭ ĉiuj ĉeestan-toj ekkantis kune kun la ĥoristoj la refrenon de „Pirin-montaro“ — ĝia simpla, sed kor-tuŝa melodio ravis la publikon!... Kaj tute merititaj estis la frenezaj aplaŭdoj...

VARIA, RIĈENHAVA PROGRAMO POR ĈIES GUSTO

Grava merito de la organizantoj de la 67-a Universala Kongreso de Esperanto estis la varia, riĉenhava programo, kiun ili proponis al la kongresanoj el preskaŭ 50 landoj el ĉiuj partoj de la terglobo, programo kapabla kontentigi ĉies guston.

Muzikaj vesperoj, teatraj prezentaĵoj („La evento“ kaj „Sen eliro“ — Francio; „Ĉu vi vidis jam la piedsignon de l'profeto?“ — Hungario, „Gastamo“ — Jugoslavio), kariljon-kaj orgenkoncertoj, plenumitaj de la grandaj belgaj muzikistoj Linda de Schepper kaj Kristiaan Van Ingelgem en la urba katedralo; multaj ekskursoj en la regiono de Lieĝo, Bokriĝ kaj ĝia subĉiela muzeo, en la mezepoka Bruĝo, en Bruselo ktp. Ni ne forgesu la junularajn aranĝojn, la 19-an Infanan Kongreseton (pri kiu oni povas ankoraŭ multon deziri!), la aŭkcion de esperantaj raraĵoj kaj tutcerte — la Kongresan Balon en la iama Borso kun ĝia nepriskribebla gaja etoso kaj distra programo!

ĜIS REVIDO, ANTVERPENO! SALUTON, BUDAPEŝO!

Solena Fermo de la 67-a Universala Kongreso de Esperanto!

Solena ceremonio: Budaĉeŝto transprenas la Kongresan Flagon de Antverpeno, kiu flirtados dum la venontjara 68-a UK en la ĉefurbo de la Hungara Popola Respubliko.

Adiaŭaj vortoj, dankaj vortoj pro ĉio, kion la dommastroj en Antverpeno disponigis al la kongresanoj dum unu neforgesebla E-semajno.

Super ĉio regas la arda sincera deziro de ĉiuj kongresanoj vivi kaj renkontiĝi en paco, gardi la pacon kaj batali por paco, por la venko de la noblaj ideoj de la Internacia Lingvo Esperanto en la tuta mondo.

Gis revido, Antverpeno!
Saluton, Budaĉeŝto!

Antverpeno—Sofio,
aŭgusto, 1982

D. SIMEONOV



Grupo da ekskursanoj dum vizito de Bruselo

BULGAROJ SUR LA PAĜOJ DE LA BELGA GAZETARO

Dum la 67-a UK en Antverpeno la aktivado de la bulgaraj kongresanoj altiris la atenton de reprezentantoj de la belgaj Radio kaj Televido kaj de la valona kaj flandra gazetaro. Aperis multaj informoj pri la aktiva partopreno de la bulgaroj en diversspecaj aranĝoj. En sia speciala numero de la 18-a — 26-a de aŭ-

gusto j. k., dediĉita al la E-kongreso, la organo de la Belga Komunista Partio „De Rode Vaan“ publikigis intervjuon kun Donĉo Hitrov, ĉefredaktoro de „Bulgara Esperantisto“ kaj prezidanto de ILEF pri la MEM-agado, pri la disvastigo de Esperanto en Bulgario kaj pri ĝiaj perspektivoj por la estonteco.



Leuven

La TEJO-kongreso en Leuven

menciindas „La Monmartra sprito de R. Schwartz“ de J. R. Boulet, „Mi en la socio“ de T. Tyblewski, „Komputero kaj lingvistiko“ de Petro de Smedt kaj „La scienca kaj eldona centro de UEA“ de Andras Lukacs.

En Leuven la gejunuloj venis ne nur por pridiskuti la kongresan temon, sed ankaŭ por ekkoni Belgion. Dum la ekskursita tago oni vizitis multajn belegajn vidindaĵojn: la Reĝa Muzeo pri Meza Afriko en Tervuren, la restaĵoj de la cistercia abatejo (fondita en 1246) de Villers-la-Ville, la novkonstruita universitata urbo Louvain la Neuve. Multaj kongresanoj ankaŭ partoprenis specialan ekskurson al la bierfarejo Artois, la plej granda bierfarejo de Belgio.

La Flandra Esperantista Junulara Asocio (FEJA) kaj la Leuvena Esperanto-Asocio „Esperanto 2000“ inde organizis la Internacian Junularan Kongreson. La membroj de LKK laboris senlace. Oni povis vidi tage kaj nokte la prezidanton Jean-Pierre Fertinel, Kristyn Tytgat, sian fraton Wim kaj aliajn LKK-anojn ĉiam pretaj helpi.

La Bulgara Esperanto-Muzeo prezentis malgrandan ekspozicion de poŝtkartoj el Leuven de 1905–1906. Inter ili estas unika karto kun portreto de Zamenhof, eldonita de Esperantista Leuvena Grupo en 1903. Nuntempe la korespondado inter bulgaraj kaj belgaj esperantistoj, komencita en la unuaj jaroj de nia jarcento, daŭras plu kaj fortikiĝas la amikaj rilatoj serve al la paco.

Paulina LAZAROVA

En la flandra universitata urbo Leuven (Belgio) inter la 31-a de julio kaj 7-a de aŭgusto k. j. okazis la 38-a Kongreso de TEJO. Ĝin partoprenis ĉirkaŭ 350 gejunuloj el 28 landoj.

La kongresa temo estis „Scienco kaj socio“. Ĝi elvokis grandan intereson kaj ties multaj aspektoj estis traktitaj en laborgrupoj kaj prelegoj. Plej multnombraj publikon altiris la prelego „Scienco kaj pseŭdoscienco en la socio nuntempa“ de Claude Piron (Svislando), kies popularajn librojn (sub la pseŭdonimo Johan Valano) kaj sonkasedon oni povis aĉeti en la librostando. Inter la aliaj prelegoj

PROFUNDA ESTIMO AL LA INTERNACIA LINGVO

Esperanto estas senpera ponto por interŝanĝo de kulturaj valoroj inter la popoloj, sed Esperanto kreas ankaŭ propran kulturon, kies ĉefa branĉo estas la literaturo. Al la Esperanto-kulturo kontribuas ne nur verkistoj kaj tradukistoj, sed ankaŭ kantistoj, pentristoj, aktoroj. Pri tio atestas la multnombraj E-konzertoj, recitaloj, teatraj spektakloj kaj ekspozicioj.

La plej lasta atesto pri la ekzisto de vasta Esperanto-kulturo estas la ekspozicio de la elstara nederlanda pentristo Hugo Landheer en la hungara urbo Szentendre.

Hugo Landheer, kies edzino estas longjara esperantistino, sincere kaj profunde simpatias al la Internacia Lingvo. En Szentendre, unu el la plej pitoreskaj hungaraj urboj, la nederlanda pentristo prezentis 50 bildojn, kiujn li elkore donacas al la Hungara Esperanto-Asocio. Ĉe la inaŭguro de la ekspozicio, d-ro Endre Baráth, la ĉefsekretario de Hungara Esperanto-Asocio, parolis pri la

vivo kaj riĉa kreado de la talenta nederlanda pentristo. Hugo Landheer naskiĝis en 1897 kaj de sia 10-jara aĝo pentras. Li finis la Akademion en Haga kaj longajn jarojn estis profesoro en la sama akademio. Dum la Dua Mondmilito li aktive partoprenis en la batalo kontraŭ la faŝismo en Nederlando. Liajn bildojn oni ekspoziciis en diversaj eŭropaj urboj kaj multaj artgalerioj posedas liajn pentraĵojn.

Hugo Landheer estas delikata lirika artisto. El liaj pentraĵoj radias la kvieto de la nederlanda naturo kaj la romantikeco de la nederlandaj urboj. En la bildoj dominas la varmaj tonoj, kiuj aludas pri trankvilo kaj silento. Per sia originala arto la pentristo atestas sian grandan amon al la mondo kaj la homoj. Per sia valora donaco al Hungara Esperanto-Asocio Hugo Landheer esprimis sian profundan estimon al la tutmonda Esperanto-movado kaj al ĝia nobla humana agado.

Georgi MIĤALKOV

KONGRESO DE IFEF EN BALATONFÜRED

Marin MARINOV —
prezidanto de BFES ĉe BEA

Fakte la kongreso komenciĝis je la 1-a de majo en Budapeŝto, ĉar pluraj honoraj membroj kaj IFEF-estranaroj, inkluzive la grupon de 13 bulgaraj fervojistoj-esperantistoj alvenis jam je la 30-a de aprilo por ĉeesti la solenan paradmarŝon okaze de la granda festo de tutmonda laboristaro — la Unua de Majo!

Menciinde estas, ke dum tiu kongreso realiĝis la baza principo de la kongreso: ĝi efektive estis kongreso de junularo kaj paco! La junuloj vere refreŝigis la kongreson: 25 partoprenantoj el 17 landoj en uniformo daŭrigis la tradicion de uniformprezentado. Entute la kongreson partoprenis 605 delegitoj el 22 landoj.


La kongreson salutis eminentaj reprezentantoj de la Hungaraj Statfervojoj, IFEF-estranaroj kaj reprezentantoj de la landaj sekcioj de IFEF, inkluzive la reprezentanton de la Bulgara Fervojista E-Sekcio — M. Marinov.

Specialan atenton kaj interesigon al la kongreso manifestis la Hungara Televido kaj gazeto „Magyar Vasutas“ (Hungara Fervojisto). La dua programo de la Hungara Televido emisiis longan kolorprogramon pri la kongreso.

En la Domo de la Urba Konsilantaro okazis akcepto, dum kiu ties prezidanto Istvan Racz detale konigis al la ĉeestantoj la historion de urbo Balatonfüred.

Cefa temo de la kongreso estis la fakprelego de ing. Istvan Gulyas — „La estonto de la eŭropaj fervojoj kaj la rolo de la Hungaraj Statfervojoj“; sekvis diaprogramaj projekcioj pri la historio de la fervojoj, pri la fervojoj en diversaj landoj, pri la plej belaj urboj kaj regionoj de Hungario.

Menciinda estas ankaŭ la fakprelego titolita: „La aktualaj taskoj de Hungaraj Stat-



fervojoj — pri la trakmodernigo, pri la moderna direktado de manovraj stacioj, pri la plibonigo de la laborkondiĉoj kaj la protekto de la vivo kaj sano de la fervojlaboristoj“.

Bone organizitaj interesaj ekskursoj kaj balo, riĉenhava kulturprogramo kun poemoj-perloj de la hungara literaturo, hungaraj kantoj kaj folkloraj programeroj sukcese amuzis la kongresanojn.

Ce la fino de la kongreso unuanime estis akceptita grava rezolucio emfazanta, ke la paca kunvivado de la popoloj estas endanĝerigita, kio kontraŭstaras al la Fina Akto de Helsinkil!

Unuanime estis akceptita la invito fare de la Bulgara E-Fervojista Sekcio, ke la 36-a kongreso de IFEF okazu en Bulgario ĉe nia suna marbordo — en la somerrestadejo „Slanĉev Brjag“.

La aplaŭdoj, kiuj postsekvis la anoncon de tiu decido montris, ke la 36-a kongreso de IFEF povus fariĝi unu el la plej amase vizitataj kongresoj en la historio de IFEF, des pli ke ĝi estos ligita kun la 75-a datreveno de la fondiĝo de IFEF.

Ni strebu fari ĝin ankaŭ la plej sukcesa!

DISTRIKTA KONFERENCO

La 25-an de junio j. k. en Ruse okazis Distrikta Scienc-praktika Konferenco lige kun la 75-jara jubileo de BEA.

En la konferenco partoprenis ankaŭ esperantistoj el urboj Bjala, Dve Mogili, vilaĝoj Batiŝnica kaj Borovo.

La sekretario de la urba societo „Libero“ Ivan Slavov jaris detalan raporton pri la disvolviĝo de la E-mo-

vado en Ruse kaj la distrikto. La partoprenantoj esprimis sian rekonon kaj estimon al la jam forpasintaj lokaj pioniroj, kies kontribuo estas konata en la historio de la movado.

La E-veteranoj Sava Ivanov, Dobri Kolarov, Baltaĝiev kaj Boris Kavalĝiev rakontis rememorojn.

B. KAVALĜIEV

KLUBO „JUNA ESPERANTISTO“

Rezulte de la enkonduko de Esperanto kiel fakultativa lernobjekto en la 9-aj kaj 10-aj klasoj de la ĉiujspacaj mezlernejoj ekfunkciis multaj E-kursoj. Lige kun tio ekestis la problemo pri reteno de la intereso al Esperanto kaj pri altiro de la junaj kursanoj al la E-movado. Interesa kaj valora agadformo estas la amatora aktivado.

Tiel ekzemple unu el la iniciatoj de la antaŭ nelonge fondita Sofia E-Kulturcentro estis la kreo de klubo „Juna Esperantisto“. Ĝiaj membroj estas gelernantoj el la mezlernejoj en Sofio, kiuj lernas Esperanton en fakultativaj kursoj. Vigle ekagis en tiu perspektiva laborkampo la instruistino en la Supera Instituto pri Teatra Arto Stefka Kalimenova. Sub ŝia energia kaj kompetenta gvidado la anoj de la novefondita klubo preparis riĉenhavan programon el esperantaj versaĵoj kaj kantoj, dediĉitan al la 100-jara jubileo de Georgi Dimitrov. Oni prezentis la programon en la ĉi-jara Revuo de la E-Parolo kaj Kanto en Pleven. La grupo bone sin prezentis kaj gajnis duan premion. Lige kun tiu ĉi arta agado de la sofiaj gelernantoj mi volas dividi ĉiujn miajn pensojn kaj ideojn por popularigo de la E-agado en la sfero de arto inter la gelernantoj kaj la junularo en nia lando.

La E-societoj devas montri eltrovemon kaj iniciatemon al la junaj partoprenantoj en la fakultativaj E-kursoj en la lernejoj. Tiurilate oni fondu grupon, kiu aktivu per belartaj muntaĵoj el E-versaĵoj kaj kantoj, skeĉoj, recitaĵoj k. a. Ĝi grave efikus sur la daŭran interesiĝon kaj lingvan perfektigon de la gelernantoj. Tiu arta E-agado certe variigus kaj riĉigus

la societajn kunvenojn kaj aranĝojn per belartaj programoj. Tamen ĉio ĉi malfacile povas okazi nur per propraj fortoj de la societoj. Ili havas nesufiĉe bone aranĝitajn klubojn, la kondiĉoj ofte ne respondas al la nuntempaj postuloj de la junularo. Pro tio la artagado de la grupoj devas esti direktita al kunlaboro kun la junularaj domoj kaj kluboj, kiuj funkcias en ĉiuj urboj kaj pli grandaj vilaĝoj. Tiamaniere ni komencos labori en vera junulara medio, ricevos kompetentan organizan helpon, uzos la bonegan materialan bazon de la junularaj kluboj. Se ni ne faros tion, ni izoligos de la junulara medio kaj nenion atingos nur per propraj fortoj. Plej fruktodona komuna agado kun la Komsomolo povas realiĝi, se la belartaj E-grupoj penetros en la sekciojn pri amatora artagado en la junularaj kluboj kaj domoj. Tiamaniere ni sukcese propagandos kaj popularigos la internacian lingvon kaj manifestos ĝian sukcesan aplikadon en la belarta sfero. Tiel la loka loĝantaro konvinkigos, ke Esperanto povas esti sukcese utiligata en la amatora artagado. Per tio la E-societoj atingos gravajn rezultojn por popularigo de la Internacia Lingvo.

Por ne kompromitiĝi antaŭ la lokaj instancoj kaj publiko, ni devas proponi la plenumon de tiu ĉi respondeca agado al kompetentaj personoj. Ili devas bonege posedi Esperanton kaj havi la necesan pedagogian sperton. Kun pacienco kaj takto ili eklaboru kun la junaj esperantistoj por sukcesplena aplikado de Esperanto en la amatora aktivado de la junularo.

Jorjeta ZDRAVEVA

TRI VOLUMOJ HONORE AL DIMITROV

361 dokumentoj estis elektitaj por la unua volumo de la trivoluma dokumentaro „La proceso lige kun la incendio en la Parlamento“. Ĝi aperos en la „Dietz“-eldonejo okaze de la centjara jubileo de la bulgara komunismo.

La dokumentaro, kiu estas kolektiva verko de la institutoj pri marksismo-leninismo ĉe CK de SED (SUG) kaj ĉe CK de KPSU kaj de la Instituto pri Historio de la Bulgara Komunista Partio ĉe CK de BKP, estis la unua ampleksa marksisma-leninisma priskribo de la parlamenteja incendio kaj de la proceso mem.

La tri volumoj ampleksas la periodon de la 27-a de februaro 1933 — la antaŭvespero de la parlamenteja incendio ĝis la 28-a de februaro 1934 — la definitiva liberigo de Dimitrov kaj la kunakuzitoj Popov kaj Tanev.

La unua volumo enhavas plejparte skribaĵojn de Dimitrov. Sed ankaŭ estas publikigitaj materialoj, kiuj informas pri la internacia movado por liberigo de la komunistoj, akuzitaj fare de la faŝistoj.

Ĉiuj leteroj, skribaĵoj kaj klarigoj de Dimitrov estas presitaj en tiu ĉi eldono en la germana originala teksto. Ili pravas kiom Dimitrov dediĉis sin al la germana lingvo dum la aresto, por ke li povu defendi sin kaj la kunakuzitojn antaŭ la faŝista tribunalo.

La dokumentoj de Dimitrov pravas la obstinan batalon de la bulgara gvidanto de laboristoj kontraŭ la faŝisma klasjustico. Ili atestas samtempe, ke la komunistoj en kaj ekster la faŝista malliberejo staris je la pinto de la batalo.

Oskar STOLBERG (GDR)

JEN ANKAŬ LA PENSIIGO... NUN KIEN?

La problemoj pri maljuneco, pri la aĝo de emeritiĝo estas unu el la plej aktualaj problemoj de nia jarcento. La demografiistoj asertas, ke la homaro maljuniĝas. Ĉiujare plimultiĝas la grandaĝa loĝantaro de nia planedo kaj pliaj landoj transiras al la grupo de ŝtatoj, kiuj troviĝas en stato de demografia maljuneco. Tio signifas, ke la nombro de personoj, kiuj pasis la aĝon de 60 jaroj prezentas pli ol 12% de la tuta loĝantaro.

Bulgario jam delonge transpaŝis la limon de demografia maljuneco. Jam en la fino de 1965 13,2% de la loĝantaro konsistis el personoj pli ol 60 jarojn aĝaj. La nombrado de la loĝantaro en 1975 montras, ke tiu ĉi nombro rimarkeble plialtiĝis — 16,3%. En la urboj ĝi estas 11,5%, kaj en la vilaĝoj — konsiderinde pli alta — 22,5%. Sed la nocio maljuneco kaj la limoj de la maljuneco grave ŝanĝiĝis. Se en la komenco de la jarcento 50-jaruloj oni konsideris jam maljunuloj, nun, kiam la meza vivdaŭro estas 70 jaroj, la kriterio estas tute alia.

En Bulgario la emerita aĝo por virinoj estas 55 jaroj, kaj por la viroj — 60 jaroj, ĉe respektiva labordaŭro de 20 kaj 25 jaroj. La kondiĉoj de emeritiĝo estas inter la plej favoraj en la mondo. Ĉe ilia determino oni prenis en konsidero, ke la adaptebleco de la homo malpliigas kaj oni malfacile povas konservi la samajn intensecon kaj ritmon de laboro. Sed tio ne signifas, ke tian personon oni rigardas kiel nenecesan, senutilan membron de la socio.

En nia lando ĉiuj homoj, kiuj atingis la aĝon de pensiigo, rajtas forlasi la aktivan laboron. Sed se ili preferas plu labori, oni ebligas al ili daŭrigi sian laboraktivecon en la sama branĉo aŭ pro la aĝaj specifajoj, — en alia sfero de la produktado.

Kiel el sociala, tiel ankaŭ el ekonomia vidpunkto, en intereso de nia socio estas la kresko de la kontingento de laborantaj pensiuloj, kies profesiaj sperto kaj lerteco havas

gravan signifon por la profesia instruado de la juna generacio. Tio praktike estas fruktodona utiligo de la pensiuloj en la periodo inter la jure difinita aĝo por pensiigo kaj la reala aĝo por ĉesigo de la laboraktiveco. La Leĝo pri Emeritiĝo reglamentas la rajton de pensiuloj labori kaj ricevi kroman salajron aldone al sia pensio.

Kien do post la pensiigo? Al tiu ĉi demando ekzistas multaj respondoj, por kies realigo nia socio kreis la necesajn ekonomiajn kaj socialajn kondiĉojn. Ĉiu persono, atinginta aĝon de pensiigo, povas agi tiel, kiel li opinias plej oportune por si: plu labori, pensiigi aŭ labori dum reduktita labortago, ŝanĝi la branĉon de sia laboraktiveco, preni laboron hejme aŭ sin okupi pri terkulturado. Dum la lastaj jaroj karaktera por maljunuloj estas la procezo de remigrado: post pensiigo ili revenas en siajn naskiĝlokojn kaj okupiĝas pri agrikulturo, en ties nombro ankaŭ la longvivuloj. En Bulgario vivas pli ol 1 000 centjaruloj.

La ebleco labori, disponigita al pensiuloj, havas gravan signifon por evito de la stresostato kaj apero de la tiel nomata „pensiula malsano“.

La problemoj pri la „pensiula malsano“ ĉe esperantistoj tute ne ekzistas. Male, nur tiam, havante pli da libera tempo, ili povas plene dediĉi ĉiujn siajn fortojn al la Internacia Lingvo, partoprenante per sia longjara sperto en la agado de la loka E-societo, ĉu kiel estraro, ĉu kiel simpla aktivulo, aŭ (se oni estas kapabla fari tion) ellaborante lernolibrojn, tradukante el nacia lingvo en Esperanton ktp.

Tiamaniere pere de Esperanto la emerito plu sentas sin persono valora kaj necesa por la socio kaj tio, kompreneble, donas al li pliajn fortojn por vivi kaj esti utila.

Pavlina MIĤAJLOVA
Dimitrina SPASOVA

VIRINA RENKONTIGO

La 22-an de junio j. k. en la klubo de la sofiaj esperantistoj — strato „Serdika“ 13, okazis emocia renkontigo de la virinoj. E-aktivulinoj el Sofio.

Inter la ĉeestantinoj estis Bogdana Popova kaj Tinka Lakova — veteranoj de la virina E-movado.

La prezidantino de la Komisiono pri Virina Agado

(KVA) ĉe BEA Belka Beleva informis pri la aktiveco de KVA ĉe UEA kaj de KVA ĉe BEA.

La partoprenantinoj en la renkontigo akceptis decidojn lige kun la taskoj, starigitaj de la CE de BEA kaj de la Komitato de la Movado de Bulgaraj Virinoj.

M. B.

TALENTA KANTISTINO-ESPERANTISTINO



Je la 29-a de januaro ĉi-jare la Popola Operteatro kaj la Klubo de Kulturaj Agantoj en Stara Zagora solene celebris la 70-jariĝon de la veterano de la operarto, laŭreato de „Dimitrov-premio“ kaj multjara aktiva esperantistino RENE JORDANOVA.

70 jaroj, tio estas tre longa vivovojo. Kaj la vivo de Rene Jordanova estas plena de konstanta fruktodona laboro.

Rene Jordanova naskiĝis la 20-an de oktobro 1911 en Sofio. Dum la Balkana Milito pereis ŝia patro kaj ne post longa tempo mortis ankaŭ la patrino. La orfan knabinecon edukis malriĉa laborista familio. Multe pli malfrue ŝi rememoras: „Mi devis tro frue sperti la krudecon de la vivo“. Jam en la lernejoj jaroj en ŝi maturiĝas la deziro studi muzikon. Tiutempe ŝi estas solistino en la ĥoro de Bukoreŝtieva. Oni konsilis ŝin studi muzikon. Fine ŝia revo realiĝis — en 1929 ŝi estiĝis studentino en la Muzika Akademio kaj finis ĝin kun tre bona rezulto. Samtempe ŝi lernis kvin fremdajn lingvojn — francan, italan, germanan, rusan kaj Esperanton.

Dank'al ŝia bela voĉo, ŝi elkreskis kiel elstara operkantistino. Por ŝia longjara kaj utila laboro en la kampo de operarto, la Stata Soveto de P.R.Bulgario honoris ŝin per la titolo „Laŭreato de Dimitrov-premio“.

Kiel lernantino en la unuaj klasoj de la gimnazio ŝi komencis lerni Esperanton aŭtodidakte kaj arde ĉirkaŭprenis la idealojn de la Esperanto-movado — paco, amikeco kaj interkompreniĝo inter ĉiuj popoloj en la mondo. Ŝi plej aktive partoprenis la kongresojn de BEA kaj la internaciajn E-kongre-

sojn, kiuj okazis en nia lando. En 1963, en halo „Universiada“ en Sofio, antaŭ 4000-a esperantista publiko el 50 landoj, ŝi kantis ariojn kaj bulgarajn kantojn en Esperanto. Ŝi ankaŭ partoprenis la internaciajn Esperanto-kursojn en nia lando — en Pamporovo, Meden Rudnik apud Burgas, Velingrad kaj la internacian seminarion en Gjula — Hungario. Ŝi estas diplomita instruistino de Esperanto kaj gvidis urbajn kursojn por komencantoj, kie ŝi preparis la gekursanojn kanti kaj reciti.

Rene Jordanova dum pluraj jaroj estis membro de la estraro de l'urba E-societo „Verda Stelo“ kaj de la distrikta E-organizaĵo. En 1979 ŝi estis prezidantino de E-societo „Verda Stelo“.

La solenaĵo okaze de la 70-jariĝo de Rene Jordanova estis impona kaj kortuŝa. La granda halo de la Distrikta Sindikata Kulturdomo „Mitjo Stanev“ estis plenplena. Inter la publiko estis ankaŭ multaj geesperantistoj.

La jubileulino prezentis sin per du kantoj — la bulgara popola kanto „Junulineto“ de Dobri Hristov kaj la rusa romanĉo „Foriru, ho, foriru!“

La kreaĵo portreton de Rene Jordanova prezentis al la ĉeestantoj Rosica Raĉeva, direktorino de la Klubo de Kulturaj Agantoj.

Kanĉo Kolev salutis la jubileulinon en la nomo de la distrikta kaj urba konsilantaroj de la kulturo kaj enmanigis al ŝi la honoran signon „100 jarojn depost la restarigo de urbo Stara Zagora“.

En la nomo de ĉiuj esperantistoj el la distrikto salutparolis Petko Bonev — prezidanto de la distrikta E-organizaĵo, kiu fine prezentis al la jubileulino multajn bondezirojn en Esperanto kaj enmanigis al ŝi freŝajn florojn kaj donacojn. Tio faris tre grandan impreson al la multnombra publiko, kiu havis eblecon aŭskulti esperantan parolon.

Rene Jordanova respondis al la gratuloj de k-do Bonev emfazante, ke ŝi laboris kaj plu laboros laŭ siaj fortoj kaj eblecoj por la disvastigo de nia kara lingvo Esperanto.

Sekvis vico da aliaj salutparoloj kaj programeroj.

Rene Jordanova, tre emociite, tute dankis al ĉiuj ĉeestantoj kaj ankaŭ al la partoprenantoj en la programo.

Juan-Antonio Bardem:

„MIA FILMO PRI GEORGI DIMITROV“

La mondkonata hispana reĝisoro Juan Antonio Bardem estas aktivulo de la Hispana Komunista Partio, arda defendanto de la demokratiaj rajtoj kaj de siaj pozicioj en la arto — eĉ el la mallibereja ĉelo.

Naskita en Madrid en 1922, Bardem kreskas en artisma medio — liaj gepatroj estis aktoroj. En 1947 li finstudas ankaŭ la Instituton de Kinematografio. En 1951 kune kun sia profesoro Luis Berlanga li kreas la belartan filmon „Bonvenon, s-ro Marshall“, kiu plifirmigis la mondan prestiĝon de la hispana filmarto. De post tiam ĝis hodiaŭ li kreis 15 filmojn, iuj el ili estas distingitaj per internaciaj premioj. En siaj filmoj Bardem elmontras la dekadencan de la superaj medioj de la hispana socio.

Antaŭ nelonge Juan Bardem finis la filmadon de belarta filmo pri la gvidanto de la bulgara laborista klaso kaj elstara aganto de la internacia komunista movado — Georgi Dimitrov.

Tiukaze ni publikigas la intervjuon de la ukraina reĝisoro Nikolaj Maŝenko, kiu prezentas Juan Bardem kaj lian filmon „La Averta“.

* * *

Min emociis la novaĵo, ke Juan Bardem faras filmon pri la elstara aganto de la monda komunista movado — Georgi Dimitrov. Apartaj epizodoj de tiu ĉi filmo estis filmitaj en Kievo kaj tio ja permesis al mi renkontiĝi kun Bardem. Mia unua demando al li estis:

— KIEL NASKIĜIS LA IDEO PRI TIU ĈI FILMO?

— En 1976 — diris Bardem — mi havis la feliĉon esti membro de la internacia jurio de la filmfestivalo en Lejpcigo, GDR. Tie mi eksciis, ke germanaj kaj italaj filmistoj intencas krei filmon pri la Lejpciga juĝproceso en 1933 kaj pri ĝia brava heroo Dimitrov. Antaŭ tio mi partoprenis kontraŭleĝe la sesion de la Monda Konsilantaro por Paco en Sofio (tiam la reĝimo de Franko ankoraŭ ekzistis en Hispanio). Miaj bulgaraj amikoj donacis al mi rimarkindan — riĉe ilustritan libron pri Dimitrov. La personeco de tiu brava filo de la laborista klaso min vigle ekinteresis. Pli malfrue — en 1980, oni invitis min partopreni renkontiĝon kun bulgaraj filmistoj okaze de la 1300-jariĝo de la bulgara ŝtato, organizitan en la bulgara ambasadejo en Madrid. Interalie mi de-

mandis la ĝeneralan direktoron de Bulgara Kinematografio pri la sorto de la filmo pri Dimitrov. La respondo ĝojigis min: „Oni ne realigis ĝin... Eble vi tion faros? Tiu ĉi propono profunde emociis min. Mi sciis, ke en 1982 la progresema homaro celebros la 100-jaran datrevenon de Dimitrov. Mi estas hispano, sed Dimitrov apartenas al ĉiuj nacioj, li estas simbolo de la batalo por paco, kontraŭ la militpotencoj, kiuj volas ĉion detru. Senhezite mi akceptis la proponon!... Tiu ĉi filmo devis esti rakonto pri la komunisto, kiu honeste plenumadis siajn partiajn taskojn, havis siajn proprajn problemojn, ĝojojn kaj klopodojn.“

— KIAJN PERIODOJN EL LA VIVO DE DIMITROV VI PREZENTAS EN VIA FILMO?

— La plej komplikitajn: la eventojn en 1932—1933, kiam Dimitrov aktive laboras en la Kominterno (Komunista Internacio); lian areston en Berlino lige kun la incendio de Reichstag (Parlamentejo). Mi enkondukas en du lokoj la eventojn en 1935, kiam Dimitrov prononis sian femparoladon antaŭ la delegitoj de la VII Kongreso de la Kominterno en Moskvo. La eventoj en la lasta parto de la filmo okazas en 1982, sed mi ne ŝatus paroli pri tio. Ĝi estu surprizo por la spektantoj.

— MI SUPOZAS, KE NE ESTIS FACILE TROVI KONVENAN PLENUMANTON DE LA ROLO DE DIMITROV?

— Tiu problemo estis unu el la plej gravaj por mi. Mi trarigardis multajn bulgarajn filmojn, fotografaĵojn de konataj kaj nekonataj bulgaraj aktoroj, materialojn el la Muzeo de Dimitrov, mi tralegis iujn el liaj verkoj. Mi volis trovi profesion aktoron, kiu ankoraŭ ne partoprenis filmon. Krome, mi serĉis nepre bulgaran aktoron, kiu simulu ekstere kaj spirite al Dimitrov. Inter la kandidatoj mi elektis la aktoron Petar Gjurov el la Teatro de la Popola Armeo. Estis vere agrebla labori kun tia inteligenta aktoro! La filmadon realigis la bulgara kameraisto Plamen Vagenštajn.

La filmo pri Georgi Dimitrov jam ekzistas. Mi estas certa pri ĝia sukceso!

Pri la literatura konkurso de revuo „Bulgara Esperantisto“

Pasis la laŭvica literatura konkurso de „Bulgara Esperantisto“. La konkursoj, kiel ĉiuj eventoj, montras, post certa periodo, prosperon aŭ regreson kaj rilate al la kvalito de la verkoj kaj rilate al la nombro de la partoprenantoj. Ĉi-jare al la redakcio alvenis nur 30 verkoj de 18 aŭtoroj: 19 originalaj versaj, 5 tradukaj poeziaj, 6 originalaj prozaj verkoj.

Antaŭ ĉio ni devas emfazi, ke multaj el la prezentitaj verkoj ne respondas al la anoncitaj temoj de la konkurso. Pro tio la ĵurio avertas, ke estonte similaj verkoj estos konsiderataj ekster la konkurso.

La literaturaj kvalitoj de preskaŭ ĉiuj materialoj estas nekontentigaj. Nesufiĉa estas la kompreno de la literatura formo: ĉu verso, ĉu rakonto, ĉu esejo? Kompreneble, iam la formo povas esti „miksita“ (ekz. verso-esejo, aŭ rakonto-rememoro, eĉ poezio kaj prozo ktp.), sed tiukaze devas ĉeesti la formaj elementoj de la konsistigantaj la verkon literaturaj formoj. Ne nur la rakontoj, sed ankaŭ la versoj, kiujn ni ricevis, estas nur vorta fotografio, ordinara informo pri iu evento, nenion sugestanta artikolo.

La poezio estas, antaŭ ĉio, atmosfero, supera humoro, maltrankvila movo de l'animo, kiu devas emociigi la leganton. Ni parolas pri poezio en la prozo, en la muziko, en la pentroarto. Ekzemple: „Pluvus. Tutan tagon pluvus...“ Sed poste? Kian impreson faras la pluvo, kiajn sentojn kaj pensojn elvokas?

La ideo de la verko devas esti sufiĉe profunde eksentita, klare vidita, neeviteble akceptita, entute travivita kaj belarte, konvinkante prezentita al la leganto.

En la rakontoj mankas klara temo kaj alloga intrigo. Ofte la eventoj de la rakonto ne sekvas unu la alian sinsekve, logike.

La lingvo estas malaltnivela; ne estas uzataj literaturaj figuroj: komparoj, metaforoj, tropoj¹ k. a., kiuj konsistigas la belartan bildon.

La materialoj ofte estas troŝargitaj de superflua teksto — nur vortoj, vortoj, kiuj nenion kontribuas al la ideo, al la verko.

Iuj aŭtoroj verkis melodiajn al siaj tekstoj. Sed en la kanto ili ŝanĝas la akcentojn de la vortoj, ekzemple: „pärcli, čtē“ ktp. En la kantoj la vortoj ankaŭ devas paroli per sia riĉa enhavo, sono, akcento!

La tradukantoj devas rilati al la tradukata poezio kun kompreno kaj majstreco. Ili devas nenion forigi el la atmosfero de la originalo, devas konservi la freŝecon kaj la belecon de la bildoj, la ritmon de la verso, devas serĉi belsonajn, esprimplenajn rimojn.

Tuj post la kreo de Esperanto Zamenhof, bone komprenante, ke la lingvo ne povas ekzisti sen sia literaturo, komencis traduki verkojn de geniaj aŭtoroj, kreis originalajn verkojn. Liaj „Ho, mia kor“ kaj „La vojo“ estas poeziaj perloj, poeziaj modeloj.

La esperanta literaturo ankaŭ perfektigas la lingvon, kontribuas al ĝia aŭtoritato. Tion ni ĉiam devas havi antaŭvide. Ofte en niaj konkursoj estas premiataj ne bonaj verkoj; ofte en niaj Esperanto-gazetoj aperas verkoj, kiuj havas nenian belartajn kvalitojn. Tio montras, ke ni malsuprenigas la nivelon de nia literaturo. Ni devas responde pritaksadi ĉiujn similajn okazojn, gardi la aŭtoritaton de la esperanta literaturo kaj de Esperanto.

Pri la organizado de la konkursoj: ilin oni devas sufiĉe frue anonci. La temo devas esti klare esprimita. Oni devas speciale averti, emfazi, ke verkoj, kiuj ne respondas al la konkursa temo, ne estos pritaksataj, ĉar ĉiu konkurso, per sia temo, havas siajn specifajn celojn.

La konkurso devas esti anoncita ankaŭ en la alilanda esperanta gazetararo, por ke en ĝi povu partopreni pli da esperantistoj.

1) Tropo — vortfiguro

Dimitar DENČEV

LA REZULTOJ DE LA LITERATURA KONKURSO DE «BULGARA ESPERANTISTO» — 1982

Okaze de la 100-a datreveno de la naskiĝo de l'granda filo de la bulgara popolo Georgi Dimitrov kaj la 75-jariĝo de Bulgara Esperantista Asocio, kiujn oni celebras dum la kuranta jaro, la redakcio de „Bulgara Esperantisto“ ancncis en n-ro 7/1981 literaturan konkurson pri poezio (originala kaj traduka); prozo (nur originala) — rakontoj esejoj, rememoroj, fabeloj, kantoj (kun propraj tekstoj kaj melodiaj aŭ nur per melodia al tradukita teksto); artikoloj (nur lige kun la Bulgara E-Asocio kaj la bulgara E-movado).

Kvankam la templimo por la konkursaĵoj estis plilongigita ĝis 30-a de marto 1982, en la redakcio estis ricevita nur 30 verkoj el diversaj landoj.

La jurio en konsisto: Hristo Gorov, Kunčo Valev kaj Dimitar Mutuŝev — trastudis la ricevitajn konkursaĵojn kaj aljuĝis premiojn al jenaj aŭtoroj kaj verkoj:

ORIGINALA POEZIO

II premio — 50 levoj: Penka Papazova el Jambol, Bulgario („Al mia patrujo“).

III premio — 40 levoj: Eleonora Mefert el urbo Nikolaev, USSR („Nur en nia provinco“).

TRADUKA POEZIO

III premio — 40 levoj: Wojciech Usakiwicz el Varsovio, Pollando („Por la mort' de revoluciulo“ de Wladislaw Broniewski).

PROZO

III premio — 40 levoj: Minoru Takaragi el Osaka, Japanio („La stelo de paco“).

La redakcio de „Bulgara Esperantisto“ gratulas la premiitajn aŭtorojn kaj bondeziras al ili novajn sukcesojn. Al la aŭtoroj, kies verkoj ne estis premiitaj, ni deziras pluan obstinan laboron, por ke ankaŭ ili atingu veran majstrecon.

AL MIA PATRUJO

Ĉiun tagon ĉie vin mi trovas,
en rideto homa kaj labor'.

En la vojo via mi malkovras
spurojn de l' pasinta via glor'.

Estas multaj pintoj en la vivo,
sed plej gravan montris vi al mi.

Estas multaj flirtigitaj flagoj,
sed posedas la plej homan vi!

Mia kara patruj' Bulgario
Buzluĝa'n rigardas vi fiere,
sur ĝi brilas via ruĝa stelo,
vi batalas por pac' kaj prospero!

Penka PAPAZOVA,
gajninto de la dua premio
en la konkurso de „BE“

LA OPINIO DE LA LEGANTOJ PRI „BULGARA ESPERANTISTO“

„... Vian revuon „Bulgara Esperantisto“ mi abonas jam dum kelkaj jaroj, ĉiam legante la tutan enhavon, ĉiujn artikolojn kaj informojn. Kun ĝojo mi povas konstati, ke la enhavo kaj nivelo de la revuo pliboniĝas“.

J. Tomiŝek, delegito de UEA,
Ĉeĥoslovakio

„... Unue, karaj gesamideanoj, mi deziras hurae vin gratuli pro la nova ekstera aspekto de via interesa revuo, kiu estiĝis ankoraŭ pli alloga!“

Adonis Gonzales Meana, Hispanio

„... Mi vere trovas la revuon belaspekta kaj tre interesa. Ĝi estas tiom atentokapta, ke oni ne facile flankenmetas ĝin, komencante ĝin legi“.

Jorgen H. Eriksen, Danio

„... La revuo estas tre bone aranĝita. La materialo estas interesa kaj bone redaktita. La tuta revuo elradias belecon, ĝi estas alloga kaj kvazaŭ parolas: „Foliumu min, legu min kaj konvinkigu kiel bela kaj interesa mi estas!“

Ivan Draganov, Sofio

„... Mi ĵus ricevis la januaran numeron de nia ŝatata revuo „Bulgara Esperantisto“. Ĝia eksteraĵo tiel surprizis kaj ravis min, ke eĉ ekkredi mi ne povis, ke tio ĉi estas nia organo. Bedaŭrinde, la enhavo sufiĉis nur por unuhora atenta legado! Ĉu ne eblas plimultigi la paĝojn? La enhavo estas leginda kaj bonstila.“

Koljo Petrov Pančev, Loveĉ, Bulgario

„Kio tuj estas frapa en via revuo estas la tre alta nivelo de la lingvo sen fariĝi komplikata, peza, male, la lingvo estas klara. La enhavo estas tre varia kaj interesa“.

Bertil Englund, FRG

„La legado de „Bulgara Esperantisto“ vere ĝojigas, laŭ mia opinio, ĉiun esperantiston — bulgaran aŭ alilandan, informante pri la tiel vigla kaj esperiga E-movado en Bulgario.“

La revuo estas ankaŭ tre bona informilo pri Bulgario ĝenerale, pri ties historio, kulturo, herooj, eminentuloj, vidindaĵoj ktp.

Ĝia lingvo estas tre bela kaj flua“.

Evdokia Patmian, Greklando

ĈU VI ESTAS PRETAJ POR LA ABONKAMPANJO?

Dum la lastaj jaroj nia asocia organo „Bulgara Esperantisto” — unu el la plej malnovaj esperantaj periodaĵoj en la mondo — atingis sendubajn sukcesojn: ĝia formato estis pli-grandigita, pliriĉigis kaj variigis ĝia temaro, aperis novaj aŭtoroj kun originale verkitaj materialoj, plibonigis la lingva nivelo, la eksteraj kaj la arta-teknika arango, la el-donkvanto kreskis al 6500 ekzempleroj monate, plibonigis ankaŭ la kvalito de la papero kaj presado. Al „Bulgara Esperantisto” kunlaboras multnombra stabo da korespondantoj el la tuta lando kaj el eksterlando. La revuo jam havas perantojn en 16 landoj, kiuj estas niaj sinceraj amikoj kaj propagandantoj ne nur de „Bulgara Esperantisto”, sed ankaŭ de la sukcesoj de nia socialisma patrolando kaj de ĝia pacama ekstera politiko.

Tiuj ĉi faktoj estas vere ĝojigaj, sed tamen la rezultoj de la ĉi-jara abonkampanjo ne estas kuraĝigaj — la nombro de la enlandaj abonantoj ne atingis la antaŭviditajn ciferojn.

La kaŭzo?

Malgraŭ ke al ĉiuj distriktaj kaj societaj estraroj estis sendita cirkulera letero lige kun la abonkampanjo, en kiu estis indikitaj la ĝuste difinitaj kontrolciferoj por ĉiu loĝloko en la lando, la estraroj ne organizis la necesan aktivan propagandon por „Bulgara Esperantisto”. La plej grava kaŭzo por tiaj nekontentigaj rezultoj tamen estas la manko de speciale komisiitaj respondeculoj en ĉiu distrikta kaj societa estraro, kiuj havu la taskon varbi kiel eble plej grandan nombron da abonantoj de „Bulgara Esperantisto” — des pli ke la redakcio kaj la Ŝtata Entreprenejo por Disvastigo de la Gazetaro (REP) disponigas al la enlandaj perantoj certan minimuman rabaton (3%).

La abonkampanjo en nia lando por 1983 jam komenciĝis. Ĝi daŭros ĝis la 10-a de decembro j. k.

La redakcio de „Bulgara Esperantisto” alvokas ĉiujn societajn, distriktajn kaj sekciajn estrarojn de Bulgara Esperantista Asocio kaj ĉiujn aktivulojn de BEA senprokraste komenci inter sia anaro varbadon de abonantoj al nia ŝatata revuo „Bulgara Esperantisto”.

Post la enkonduko de fakultativa lernado de Esperanto en la IX kaj X klasoj de ĉiuj mezlernejoj en la lando, tio ja donas ankoraŭ pli grandan eblecon al la lektoroj-instruistoj varbi novajn abonantojn al „Bulgara Esperantisto” inter la ĝeneralantoj.

La redakcio de „BE” denove sendis al ĉiuj distriktaj, societaj kaj sekciaj estraroj de BEA cirkulerletonon kun indikitaj abonciferoj kaj kun peto fari larĝskalan propagandan laboron por popularigo de nia asocia organo kaj kolekti kiel eble plej grandan nombron da abonantoj. Al ĉiuj, kiuj varbos pli ol 100 abonantojn, la redakcio disdonos premiojn.

Ne forgesu aboni „BE” ankaŭ por viaj eksterlandaj amikoj-esperantistoj — tio estas agrabla donaco por ili!

La bulgaraj esperantistoj abonu nepre per REP kaj la fremdlandanoj — ĉe la peranto de „BE” en la koncerna lando aŭ rekte al la adreso de la redakcio — BG-1303 Sofio, bul. Hristo Botev 97 — Bulgario.

La abonprezo de „BE” por 1983 restas neŝanĝita: por Bulgario — 2,90 levoj, por la socialismaj landoj — 5,42 levoj kaj por nesocialismaj landoj — 5,90 levoj (5 usonaj dolaroj aŭ egalvaloro en nacia valuto).

Karaj bulgaraj kaj fremdlandaj amikoj! Ne prokrastu fari vian abonon por 1983! Estu ardaj propagandantoj de „Bulgara Esperantisto”! Ni atendas vian kontribuon!

LA REDAKCIO DE «BE»

(daŭrigo de paĝo 7)

kuracista servo ne ekzistus. El kuracista vidpunkto terminoj kiel „limigita” aŭ „venka” havas nenian signifon en konteksto de la atommilito.

II. Inter tiuj, kiuj eventuale travivus post-sekvojn de la eksplodoj kaj radiado, multajn aliajn atendus longa agonio. Sennombraj estos la vunditoj kaj ne ekzistos ebleco flegi ilin. Malsatadon, epidemiojn kaj psikan streson de neantaŭvideblaj dimensioj oni ne povus forigi. La radioaktiva radiado trafus la tutan biosferon. La kompletaj socialaj, kulturaj, sanitaraĵoj nocoj kaj la neniigo de la vivmedio rezulte de atommilito daŭrus pli longe ol dum

kelkaj generacioj.

III. La atommilito en Eŭropo neniigus en mallonga tempo la tutan civilizacion kaj ĉion, kion la homaro kreis dum jarmiloj.

IV. La kuracistoj en okazo de atommilito ne havus eblecon plenumi siajn funkciojn. La sola prudenta solvo do estas ne permesi ĝin.

La aprobitaj dokumentoj plu eksplikas, ke la sola metodo por malebligi la atommiliton estas haltigi fabrikadon, eksplodprovojn kaj dislokigadon de la atomarmiloj kaj de iliaj portiloj. Ili esprimas subtenon al traktadoj por limigo kaj definitiva neniigo de la atomarmiloj en la mondo.

! Noci = matutuli

SINDONA PROPAGANDANTO DE LA E-GAZETARO

Dimitar Ivanov, aktivulo de E-societo „Kulturo“ en Plovdiv, estas unu el la plej fervoraj propagandantoj de la E-gazetaro kaj disvastiganto de nia asocia organo „Bulgara Esperantisto“. Por 1982 li kolektis 198 abonojn al „BE“. Jen kion li respondis al la demandoj de s-ino Fani Miĥajlova, kiu intervjuis lin:

— K-vo Ivanov, kiel vi sukcesis fari tiun ĉi grandan laboron?

— Mi konscias la signifon de la revuo por nia movado kaj mi strebas, ke ĝi atingu kiom eble pli multajn esperantistojn. En la komenco de la abonkampanjo mi faras planon. Kutime mi vizitas la geesperantistojn en iliaj hejmoj kaj en la laborejoj por inviti ilin aboni la revuon. Mi havas la nomaron de la pasint-jaraj abonantoj kun iliaj adresoj kaj mi faras mian planon tiel, ke ĉiutage mi vizitu kelkajn adresojn en difinita urboregiono. Ripoztagon mi ne havas. Ofte mi devas kelkfoje viziti unu kaj saman adreson, sed mi ne ŝparas miajn fortojn. Mi estas ĝoja, kiam la homoj tuj renovigas sian abonon. Kelkiujn mi devas pli longe persvadi, kelkiuj pro diversaj kaŭzoj ne plu abonas la revuon. Mi vizitas la kursojn de Esperanto kaj invitas la gekursanojn aboni al „Bulgara Esperantisto“, montrante al ili ekzemplerojn de la revuo kaj rakontante pri la diversaj interesaj legaĵoj, kiujn ili povas trovi en ĝi.

Ankaŭ dum la societaj kunvenoj mi varbas novajn abonantojn.

— Kio instigas vin apostole labori sur tiu ĉi kampo?

— Tio estas mia morala devo. Ja ĉiu esperantisto devas laŭ siaj ebloj subteni la movadon en nia lando. Kiam antaŭ jaroj mi komencis okupiĝi pri abonkolektado, mia laboro estis rekonita de la tiama prezidanto de nia societo Iv. Bataklijev kaj de la estraro. Tio estis la komenca puŝo. Poste mi kelkfoje ricevis premiojn kaj mia foto aperis sur la paĝoj de „Bulgara Esperantisto“. Ĉio ĉi stimulas min. Tiamaniere ankaŭ mi kiel membro de BEA donas mian kontribuon al la E-movado en nia patrolando.

— Ĉu vi mem legas la revuon?

— Jes, mi ŝatas ĝin. En ĉiu numero estas io interesa por mi. La varia enhavo kaj la plibonigita aspekto plaĉas ankaŭ al miaj eksterlandaj amikoj. Ne nur mi legas nian revuon, sed regule mi pagas la abonkotizon por miaj geamikoj en Sovetunio kaj GDR, ĉar mi scias, ke tio estas bela donaco por ili.

Kaj nun, okaze de la 100-a datreveno de la naskiĝo de Georgi Dimitrov, mi invitas la E-aktivulojn el la tuta lando al konkurado por varbi kiom eble pli multajn abonantojn de „Bulgara Esperantisto“ por 1983.

Fani MIĤAJLOVA

REGIONAJ PEDAGOGIAJ KONFERENCIOJ

En majo kaj junio j. k. okazis la regionaj pedagogiaj konferencioj en Targoviŝte, Trojan, Burgas kaj Ĥaskovo.

Reprezentantoj de la distriktoj raportis pri la rezultoj el la farita laboro — en la distrikto de Targoviŝte funkciis 3 E-kursoj kun 52 partoprenantoj, en la distrikto de Sumen — 7 E-kursoj kun 120 partoprenantoj, en la distrikto de Sliven — 3 kursoj kun 52 partoprenantoj, en la distrikto de Jambol — 4 E-kursoj kun 65 partoprenantoj, en la distrikto de Plovdiv — 26 kursoj de Esperanto kun ĉirkaŭ 300 partoprenantoj, en la distrikto de Ĥaskovo — kursoj kun 97 partoprenantoj.

Modelajn lecionojn prezentis V. Oljanov en Targoviŝte kaj El. Stojkova en Burgas.

Dum la konferencioj estis faritaj multaj eldiroj, estis starigitaj diversaj solvendaj problemoj — pri la manko de instruistoj, lernolibroj kaj helpiloj, pri la maniero de prezentado de la gramatika materialo, pri nesufiĉa helpo fare de la CE de BEA, pri

enkonduko de E-instruado ankaŭ en 5-an, 6-an, 7-an kaj 8-an klasojn kaj en la altlernejojn ktp.

Post la okazigo de la Regionaj Pedagogiaj E-Konferencioj ni jam povas fari kelkajn konkludojn:

Bedaŭrinde ne ĉiuj respondeculoj pri la instrua laboro ĉe la distriktaj estraroj de BEA faris precizan raporton pri la E-instruado en la koncernaj distriktoj. Ofte la raportoj estis skribitaj rapideme kaj sen detaloj, pri kio ni avertis en la komenco de aprilo sur paĝo 3-a de la marta numero de la „Informilo“. Tio parolas pri neserioza rilato al la instrua laboro. En multaj raportoj la informoj koncernis nur la agadon de la raportantoj mem aŭ la E-instruadon nur en ilia loĝloko.

Ni esperas, ke venontjare la regionaj pedagogiaj konferencioj pasos je pli alta nivelo.

Marin BACEV,
sekretario de la Instruista Sekcio ĉe BEA

Datreveno depost, datreveno ekde aŭ datreveno de?

Dum 1981 lige kun la celebrado de kelkaj rimarkindaj datrevenoj en Bulgario kiel la 1300-a datreveno de la fondiĝo de la bulgara ŝtato, la 90-a datreveno de la fondiĝo de la Bulgara Komunista Partio kaj en revuo „Bulgara Esperantisto“ kaj en aliaj bulgaraj esperantlingvaj eldonaĵoj kiel „Bulgarino“, esperanta versio de la jara eldono de Komitato de Bulgaraj Virinoj por 1981, la vorto **datreveno** estis uzita multfoje. Ankaŭ la vorto **jubileo** estis uzita same multfoje. En tiuj ĉi notoj mi deziras atentigi pri la malkorekta ligo de la vorto **datreveno** kun la vortoj, esprimantaj la eventojn, al kiuj ĝi rilatas. Temas pri la ligo, efektivigita pere de la prepozicioj **depost** kaj **ekde**, ekzemple: „1300-a datreveno **ekde** la fondiĝo de la bulgara ŝtato (BE, 1/1981, p. 2); „1300-jara datreveno **depost** la fondo de la bulgara ŝtato“ (Bulgarino, dua kovrilpaĝo); „1300-jara datreveno **de post** la kreo de la bulgara ŝtato“ (Bulgarino, p. 32 dufoje).

Malkorekta estas ankaŭ la ligo pere de la prepozicio **de** en la frazoj: „1300-jara datreveno de la bulgara ŝtato“ (BE, 11/1981, p. 32); „1300-jara datreveno de Bulgario“ (Bulgarino, p. 33).

Kial la ligo de la vorto **datreveno** pere de la prepozicioj **depost**, **ekde** kaj **de** en la supre cititaj ekzemploj estas malkorekta?

Por respondi al tiu ĉi demando, estas necese analizi la kunmeton „datreveno“. Laŭ PIV ĝi signifas „reveno de difinita dato“. Se oni komparas la vorton **datreveno** kun la latina vorto **anniversarius**, oni konstato, ke ĝi estas formita laŭ la maniero, laŭ kiu estas formita la lasta: **annus** jaro + **vertere**, **versum** returni, do **jarreveno**. Elirante el tiu ĉi analizo, oni devas konkludi, ke la nura prepozicio, per kiu la vorto **datreveno** povas esti ligita, estas **de** en ĝia poseda signifo. La prepozicioj **ekde** kaj **depost** havas nur tempo-punktan signifon t. e. respektive **de-komence de**, **define de**, kiu estas preskaŭ identa. La uzado de tiuj ĉi prepozicioj evidente estas sub la influo de la bulgara lingvo, en kiu en tiuj okazoj oni uzas la prepozicion „ot“, kiu esprimas ĝuste tempo-punktan rilaton. Per prepozicio, korespondanta al la esperanta **de** kun ĝia poseda signifo estas ligita la vorto **anniversaire** (F), **anniversary** (A), **anniversario** (H). En la rusa, la ĉeĥa kaj la ceteraj slavaj lingvoj kun kazoj la vorto, esprimanta „datreveno“ estas ligita per senprepozicia genetiva. Do, korekte estas diri: 1300-jara datreveno de la fondiĝo de la bulgara ŝtato, 100-jara datreveno de la naskiĝo de Georgi Dimitrov, 100-jara datreveno de la Liberigo

de Bulgario, 40-jara datreveno de la eksplodo de la Dua Mondmilito ktp. Anstataŭ **datreveno** oni povas uzi **jarrevenon**. Laŭ mi estas superflua la uzo de la adjektivo **jara** post la nombro, ĉar la datreveno ĉiam estas jara. Sufiĉas nur la adjektiva finiĝo „a“ post la nombro. Anstataŭ **datreveno** aŭ **jarreveno** lastatempe tre vaste estas uzata la vorto „**jarigo**“. Korekta estas ankaŭ la uzo de **naskiĝtago**, **mortotago** por datreveno de la naskiĝo, de la morto. Mi konsideras malkorekta la uzon de la prepozicio **de** en la frazo „1300-jara datreveno de Bulgario“ pro logikaj kaŭzoj, ĉar la vorto **datreveno** logike devas esti ligita ĉiam kun la evento aŭ la fakto, al kiu ĝi rilatas. La samo validas por la ligo de la vorto **jubileo**, kiu esence estas datreveno. Laŭ la tria signifo de **jubileo** en PIV ĝi estas „festo, per kiu oni solenas la centan, kvindekan aŭ kelkfoje dudekkvinan datrevenon de unu grava fakto“. En la ekzemploj, donitaj en PIV por tiu ĉi signifo de la vorto, **jubileo** estas ligita per la prepozicioj **de** kaj **pri**: la 25-jara jubileo de la tago de apero de Esperanto; la kvincentjara jubileo pri la eltrovo de Ameriko; la ora jubileo de geedzoj.

Dimitar HAĜIEV

REZULTODONA LERNOJARO



Gojigaj estas la rezultoj de la jam pasinta lernojaro por E-societo „Libero“ en Ruse: dum ok monatoj 62 gekursanoj fervore lernis la Internacian Lingvon. La plej junaj esperantistoj — la lernantoj el lernejo „Hristo Smirnenki“, helpate de sia kursgvidantino M. Belčeva, aktive partoprenis la belartan programon okaze de la fino de lernojaro. Ili kantis esperantajn kantojn kaj emociis la ĉeestantojn per la talente prezentita teatraĵo „Dorlotita Bogdanka“.

Nadja SIRKOVA

NIA SOCIETO

Nia medicinista Esperanto-societo „D-ro Zamenhof“ en Loveĉ estis fondita la 27-an de februaro 1980 okaze de la 1300-jarigo de la bulgara ŝtato. Tiu ĉi fakto kaj la antaŭstaranta en 1981 Internacia Medicinista Esperanto-Konferenco en nia lando estis bazaj stimuloj por la aktiviĝo de la societo. La penso, ke jam ĉe la unuaj paŝoj ni havos eblecon por kontakto kun esperantistoj-medicinistoj el la tuta mondo tre entuziasmis nin. . .

Nia deziro ellerni la Internacian Lingvon estis granda. Ni havis la maloftan eblecon utiligi tiun ĉi internacian medicinistan forumon sen baroj kaj aliaj malfacilaĵoj — en nia lando kaj proksime de nia urbo. Kaj la rezultoj ne malfruis. Ni jam havas kvar memstare organizitajn kursojn, el kiuj du finiĝis sukcese kaj iuj geesperantistoj — kursanoj el la aliaj du kursoj — finis la lernadon de Esperanto en la Internacia E-seminario en Borima (distrikto de Loveĉ).

Dum la lernojaro 1981-82 instruisto de Esperanto en nia kurso estis medicinisto. Ĉi-jare ankaŭ por unua fojo en nia distrikto en la E-klubo ĉe la Sindikata Domo — Loveĉ okazis E-kurso por dua grado, sub la gvidado de la merita nacia Esperanto-lektoro Ivan Liŝev el urbo Trojan. La plimulto de la personoj, sukcese finintaj la kurson, estis el la medicinista societo.

La Internacian Medicinistan E-Konferencon en Ruse ni partoprenis kun kvar sciencaj prelegoj. Kaj en decembro 1981 ni memstare organizis por la unua fojo en nia lando Nacian Medicinistan Renkontiĝon sub la nomo „Vespero de Zamenhof“. Ĉeestis ĉirkaŭ 90 esperantistoj el multaj E-societoj. Inter ili estis ankaŭ esperantistoj-eksterlandanoj el Sovetunio kaj Rumanio. Depost 1982 tiu ĉi aranĝo estos organizata ĉiujare sub la nomo „Zamenhofaj Tagoj“, per la helpo kaj sub la gvidado de la Centra Estraro de BEA — sekcio de medicinistoj, kaj certe akiros internacian karakteron. Tiel ĉiuj esperantistoj-medicinistoj havos ĉiujaran eblecon interrilati kun siaj gekolegoj el la tuta lando kaj parte el la mondo por interŝanĝo de medicinaj novaĵoj sub la devizo: „Esperanto kaj la medicino — sinonimoj de paco, internacia solidareco kaj amikeco“.

La taglibro kaj la albumo de la societo jam estas plenigitaj de aktivaj partoprenoj en societaj, tuturbaj, distriktaj, naciaj kaj internaciaj E-aranĝoj sub la gvidado de la distrikta estraro kaj de la E-klubo.

Ĉiujare la nombro de la abonantoj al E-gazetoj kaj revuoj kaj de korespondantoj plimultiĝas. La societo jam havas individuajn membron de UEA kaj interrilatojn kun esperantistoj el Sovetio, Hungario, Pollando kaj eĉ kun medicinistoj-esperantistoj el Brazilo.

La societo jam de sia fondiĝo laboras laŭ reala jarplano, konformigita al la eblecoj de la anaro. Ĝia arkivo estas relative granda kaj detale reflektas la gravajn okazaĵojn.

Niaj financaj rimedoj — de abonkotoj, kursotaksoj k. a., ankaŭ ne estas malgrandaj. Ekzemple, ĉi-jare ni proponas al niaj anoj 50%-an pagon de la takso por partopreno en la somera internacia feriado „Borima-82“ kaj la tutan takson por la triagrada E-kurso en la Internacia Esperanto-Kursejo en Pisanica.

Grave kontribuas por lernado kaj praktikado de la lingvo la organizataj E-gastadoj okaze de naskiĝ-kaj nomtagoj, geedziĝo, naskiĝo de infano, legado de interesaj leteroj de niaj eksterlandaj korespondantoj k.t.p., kaj ankaŭ kolektiva vizitado de filmoj, teatro, restoracio, kafo-dolĉaĵejo, promenadoj k. a. aranĝoj.

Ĉio dirita ĝis nun eble ne estas tiom granda, agado, sed tamen ĝi starigas nian socion en la unuajn vicojn de la E-movado en la lando. Tiu ĉi fakto tre devigas nin. . .

Nia profesio estas humana. Per la verda stelo ni la medicinistoj-esperantistoj, ĉiuj kune devas batali por la sano, la vivo kaj la feliĉo de la homaro.

D-ro Tjuran OMER,
prezidentino de la medicinista
E-societo en Loveĉ

NOVA STUDENTA E-SOCIETO

Je la fino de la lernojaro — en junio j. k., studentoj el la Supera Instituto de Zooteĥniko kaj Veterinara Medicino en urbo Stara Zagora fondis E-socion.

La fonda kunveno partoprenis la prezidanto de la DE de BEA en la urbo — ing. Petko Bonev. Per antaŭparolo al la junaj entuziasmoj-esperantistoj sin turnis la kandidato de agrikulturaj sciencoj Kina Sivkova — vicprezidentino de DE de BEA.

La membroj de la nova studenta societo havas la celon varbi novajn esperantistojn, organizi lernadon de la Internacia Lingvo, uzi Esperanton por interŝanĝo de profesiaj scioj kaj sperto, partopreni en sociopolitikaj iniciatoj.

Prezidanto de la nova societo estis elektita Nikolaj Oblakov, kaj kiel sekretario-kasistino — Radka Dimova.

La 19-an de junio j. k. la esperantistoj el Varna por kvara fojo estis dommastroj de granda E-arango — MARE'82, organizita de la DE de BEA kaj de E-societo „Albatro“ kaj dediĉita al la 100-jara jubileo de la granda filo de la bulgara popolo — Georgi Dimitrov kaj al la 75-jariĝo de Bulgara Esperantista Asocio. Partoprenis gesamideanoj el Plovdiv, Pazargik, Targovište, Popovo, Ruse. Ĉe estis ankaŭ multaj neesperantistoj — amikoj de la Internacia Lingvo.

La solena inaŭguro okazis en halo „Trakija“ per la mallonga, tamen tre emocia raporto de k-ino Venelina Angelova — prezidantino de societo „Albatro“. La prezidanto de la DE de BEA, docento Mitko Dimĉev — denaska esperantisto — salutis la ĉeestantojn kaj substrekiis la grandan signifon de tiu ĉi renkontiĝo. „Ni havas la ambicion — diris M. Dimĉev — ke MARE estigu granda internacia arango“. Aparte agrabla surprizo estis la ĵus ricevita gratulletero de la esperantistoj el urbo Rostok, GDR.



La partoprenantoj en MARE'82 dum tradicia ekskurso

Salutvortojn al la partoprenantoj direktis la reprezentanto el urbo Ruse, Nedko Nedev kaj Petja Genova, reprezentanto de la DK de BKP. Ŝi esprimis sian grandan kontenton pri la agado de la nova DE de BEA en Varna, kiu lastatempe laboras pli vigle kaj entuziasme. „La DK de BKP — ŝi substrekiis — aprobas kaj subtenos ĉiujn iniciatojn de la esperantistoj en Varna. Esperanto devas okupi sian indan lokon en niaj streboj por firmigo

de la internaciaj kontaktoj, por firmigo de la tutmonda paco, por popularigo de la sukcesoj de nia socialisma lando. Ni kredas, ke via Mara Amika Renkontiĝo Esperantista transformiĝos en internacian arangon kaj tio estos granda fiero por ni ĉiuj“.

La arta programo vekis grandan intereson. Estis projekciitaj tre interesaj diapozitivaj pri la vizitoj de Georgi Dimitrov en Varna kaj pri liaj kontaktoj kun laboristoj el Varna. La belartan programon partoprenis ankaŭ la folkloro dancensemblo ĉe la Distrikta Domo de la Sindikatoj „G. Dimitrov“, la ĥoro de knabinoj ĉe lernejo „P. Javorov“. Per versoj kaj kantoj en Esperanto sin prezentis grupo da gejunantoj el lernejo „Baĉo Kiro“, gvidataj de S. Nedeva, kiuj meritis la aplaŭdojn de la publiko. Longdaŭrajn aplaŭdojn meritis la blinda esperantisto Marin Iliev, kiu tre emocie prezentis en Esperanto la defendan paroladon de G. Dimitrov antaŭ la Lejpciga tribunalo.

La partoprenantoj en MARE'82 sendis telegramojn al la Internacia Komitato de MEM kaj al CE de BEA, per kiuj ili esprimis sian pretecon disvastigi kaj popularigi la Internacian Lingvon Esperanto kaj agadi por daŭra paco kaj amikeco inter la popoloj.

La saman vesperon okazis interkona vespero kaj la sekvan tagon gastoj kaj dommastroj ekskursis al la ripozlokoj „Amikeco“ kaj „Ora Strando“.

Per sia bona organizado, riĉa arta programo kaj agrabla etoso MARE'82 donas sian kontribuon al la Esperanto-movado en nia lando.

L. ANDREEV,
S. NEDEVA



Grupo da hungaraj kursanoj en IEK — Albena

RENKONTIGO DE ESPERANTISTOJ EN SAMOKOV

La 12-an kaj 13-an de junio j. k. en urbo Samokov por oka fojo okazis la tradicia renkontigo de esperantistoj el Sudokcidenta Bulgario.

En la renkontigo, dediĉita al la 100-jara jubileo de la naskiĝo de Georgi Dimitrov kaj la 40-jariĝo de la Patrolanda Fronto, partoprenis 120 esperantistoj el la regiono kaj el aliaj lokoj de la lando. Ĉeestis la prezidanto de la Sofia DE de BEA ing. Angel Todorov, la vic-prezidanto Marin Marinov, la sekretario Dimitar Vukovski kaj aliaj membroj de la Distrikta Estraro.

La gastoj estis afable akceptitaj de la dommastroj el E-societo „Rila-Esperantisto“. Al ĉiuj partoprenantoj estis disdonitaj bele aranĝitaj kovertoj omaĝe al la 75-a jubileo de BEA, kiuj entenis la biografion de G. Dimitrov, historian informon pri la regiono de Samokov kaj ĝia E-movado, faldfoliojn „Rondvojaĝo tra Bulgario“ kaj aliajn materialojn.

La gastoj promenis per aŭtobuso al la fama ripozloko „Borovec“ en Rila-montaro kaj de tie — per la plej moderna en la Balkana Duoninsulo turista lifto — al montopinto Jastrebec.

Post la agrabla ekskurso okazis solena inaŭguro de la renkontigo en la salono de la Sindikata Kulturdomo en Samokov. Prelegon pri la vivo kaj faro de Georgi Dimitrov faris Angel Todorov. La ĉeestantoj sendis telegramon al la Tutpopola Komitato por Pacdefendo, en kiu oni informis pri la senditaj pli ol 103 mil subskriboj de esperantistoj kaj de amikoj de Esperanto el la tuta lando al la Dua Speciala Sesio de la Generala Asembleo de UN pri Malarmado en Nov-

RIĈENHAVA JUBILEA PROGRAMO

Al la jam okazintaj multnombraj variaj aranĝoj de la E-societoj en la tuta lando aliĝis la informo sendita de societo „Libero“ en Ruse — unu el la bastionoj de nia enlanda movado. Ĝia prezidantino Nadja Sirkova interalie skribas:

„... Por digne celebri la 100-jaran jubileon de la gvidanto kaj instruanto de la bulgara popolo Georgi Dimitrov la membroj de nia societo preparis riĉenhavan planon pri la jubileaj aranĝoj.

Reaktivigis sian agadon la teatra trupo, kiu prezentis antaŭ membroj de la E-societoj en la distrikto la spektaklon „Dimitrov — forto, modelo kaj ravigo“.

Dum tri monatoj, ĉiumarde en la klubejo la membroj de la societo povis aŭskulti interesajn prelegojn kaj partopreni diversajn aranĝojn lige kun la jubileo de G. Dimitrov.

Menciinda estas la esperantista marŝo al vilaĝo Stanĉev Han, kie en 1912 estis pune alilogiĝitaj 143 strikintaj ministoj el Pernik. Pro ilia skribplendo al Georgi Dimitrov pri la kruelaj labor-kaj vivkondiĉoj, li sekrete ilin vizitis kune kun sia kamaradino Ljubica Ivoŝević kaj per ardaĵ kuraĝigaj vortoj inspiris kredon kaj esperon en iliajn animojn. La partoprenantoj en la marŝo metis florojn antaŭ la memorplatoj en tiu loko kaj sur la fasadon de la lernejo — monumentoj pri tiu malmulte konata momento el la riĉa biografio de Dimitrov.

Ankoraŭ unu marŝon — virinan, ni devas mencii: ĝis la insulo „Lileka“ (Cikonio) sur Danubo, kiun Dimitrov vizitadis dum siaj restadoj en Ruse. Tie loĝis lia amiko-kunbatalanto. Nia mirego estis senfina, kiam la pretreturanta sovetia ŝarĝsipo salutis nin per la ŝatata de Dimitrov „Kanto de vaganto“!... Tio kortuŝis nin ĝis larmoj...

Multaj estas la jubileaj aranĝoj de societo „Libero“, kies anoj digne honoris la memoron de la granda filo de Bulgario.

N. SIRKOVA, Ruse



La tradicia renkontigo en Samokov

Jorko.

Estis plenumita varia artprogramo. La partoprenantoj metis florkronon antaŭ la komuna tombejo de la herooj, pereintaj en la batalo kontraŭ la faŝismo kaj kapitalismo.

La sekvan tagon oni faris ekskurson al la ripozkomplekso „Maljovica“ en la plej bela parto de Rila-montaro. Revenante la ekskursanoj pasis tra la regiono de Samokov, ligita kun la agado de la ĝenerala sekretario de CK de BKP Todor Jivkov en 1941.

La ĉarma personeco, la vivo kaj la faro de Georgi Dimitrov la beleco de Rila-montaro, la bone organizitaj programoj faris la Okan Tradician Renkontigon de la Esperantistoj el Sudokcidenta Bulgario fruktodon kaj agrabla.

Ĝis novaj renkontoj dum la Naŭa Tradicia Festo „Samokov-83“!

Dimitar VUKOVSKI



Junaj geesperantistoj el urbo Pavlikeni

GRAVA DISTRIKTA RENKONTIĜO

Post la seminario de la tutlanda E-aktivularo pri organizaj kaj instruproblemoj en Pisanica, la Distrikta Estraro de BEA en Plovdiv okazigis je la 27-a de junio j. k. specialan konsilion kun la esperantistoj-aktivuloj el la distrikto por pridiskuto de la estonta laboro kaj ties ĉiufanka plibonigo.

La konsilion partoprenis pli ol 40 E-instruistoj, pedagogoj, membroj de societaj estraroj. La unua parto estis dediĉita al lerneaj problemoj lige kun la antaŭstaranta nova lernejo. La instruistino Lili Sotirova demonstris modelan lecionon pri la prepozicioj en Esperanto. Si profitis interesajn modernajn instruhelpilojn. Dimitar Dimitrov — respondeculo pri lerneaj problemoj en la Distrikta Estraro, informis pri la rezultoj de la pasinta lernejo kaj pri la antaŭstarantaj taskoj. Oni vigle diskutis la problemojn de la instrulaboro.

En la dua parto estis starigitaj diversaj organizaj demandoj, kiujn la partoprenantoj serioze kaj praktike pridiskutis. Fani Mihajlova donis detalajn instrukciojn pri planado de la societa agado, substrekte la gravecon de ĝustatempa sendado al la DE de precizaj informoj. Elena Mateeva instruis pri la financa agado. Danco Danev raportis pri la propaganda agado kaj Vladimir Gelev — pri akordigo de la agado inter la societoj en la distrikto, pri la helpo al la junaj estraranoj de E-societoj. Veselina Kurteva — prezidantino de la E-societo „Kulturo“ en Plovdiv, la plej multnombra en la distrikto — raportis pri ĝia varia agado.

La prezidanto de la DE Jordan Angelov informis pri la rezultodona agado de la helpa produktadentreveno, organizita de la Distrikta Estraro.

Vladimir JELEV

AERO' 82

La 12-an kaj 13-an de junio j. k. en Pazarĝik okazis Nacia E-Renkonto de Specialistoj pri Agrikulturo sub la devizo „Ni fosu nian sulkon“.

En la Esplora Stacio por Legomsejoj la partoprenantoj en la renkontiĝo aŭskultis prelegon je temo „Hidroŝarĝado de la maizo“ de la ĉefspecialisto ĉe la Distrikta Agrar-industria Asocio en Pazarĝik Kosta Din Demergiev. La agrikulturistoj-specialistoj montris vigan intereson pri la diskutitaj problemoj. Ili ĉiuj havis eblecon konstati la bonajn rezultojn de hidroŝarĝado de la maizsejoj, observante la bone kreskantajn maizplantejn en la eksperimentaj agroj.

La eksperimenta stacio „Ivajlo“, kiu festis sian 35-jaran jubileon, disponas pri ĉiuj kondiĉoj por sukcesplena okazigo de la renkontiĝo. La partoprenantoj esprimis sian dankon al la iniciatema sekretario de la Agrara Sekcio N. Kosturski — scienca kunlaboranto en la stacio kaj al ĝia direktoro. En la renkontiĝo partoprenis ankaŭ Petko Arnaudov, prezidanto de la Distrikta Estraro de BEA en Pazarĝik, en kies nomo li salutis la partoprenantojn.

La renkontiĝo oni nomis ankaŭ „ĉeriza“ pro la frukta bankedo per bongustaj ĉerizoj kaj fragoj, kiun la dommastroj organizis por la partoprenantoj.

Oni decidis, ke la venontjara AERO'83 okazu en majo en Stara Zagora. En la kadroj de la estonta renkontiĝo estas antaŭvidita vizito de la Esplora Stacio pri Rozoj kaj Eter-oleaj plantoj. AERO'84 okazos en julio 1984 en Pomorie, en la Eksperimenta Stacio pri Subtropikaj Plantoj.

La partoprenantoj en la renkontiĝo decidis ankoraŭ pli obstine labori por plimultigo de la ILASE-anaro en nia lando.

ORIGINALA EKSPOZICIO

La E-veterano Jordan Atanasov — emerita instruisto el vilaĝo Polsko Kosevo, distrikto de Ruse, organizis en la salono de la loka popola legejo „Razvitie“ („Progreso“) originalan ekspozicion pri Esperanto el diversnaciaj esperantaĵoj kaj korespondaĵoj — okaze de la 75-jara jubileo de Bulgara Esperantista Asocio kaj memore al la unua esperantisto en la vilaĝo Krastju Jordanov Kretev, forpasinta antaŭ 75 jaroj.

La ekspozicio provokis vigan intereson inter la loĝantaro kaj havis grandan sukceson.

Gratulojn kaj bondezirojn al la iniciatintoj.

K. K.



Parto de la eksponaĵoj

JUBILEULOJ EL PAZARĜIK


La membroj de E-societo „Radio“ en Pazarĝik solene festis la 90-jariĝon de Vasil Genčev — unua prezidanto de la societo post 1944 kaj longjara E-aktivulo. Pri la vivo kaj la agado de V. Genčev prelegis Nikola Carcarov kaj rakontis rememorojn Kosta Konstantinov.

La esperantistoj el Pazarĝik festis ankaŭ la 60-an naskiĝtagon de la ĵurnalisto-esperantisto Konstantin Vasilev Genčev. Pri lia sociagado parolis M. Dimitrov — prezidanto de E-societo „Radio“. Raško Todorov — reprezentanto de la Komunuma Komitato de la Patrolanda Fronto en Pazarĝik tralegis salutleteron al la jubileulo. Estis tralegita ankaŭ saluttelegramo de la Asocio de Bulgaraj Ĵurnalistoj.

La ensemblo por popolkantoj kaj dancoj ĉe la Distrikta Popola Konsilantaro plenumis interesan programon.

R. GEORGIEVA

INTERNACIA ŜAKTURNIRO EN TARGOVIŠTE



De la 17-a ĝis la 26-a de junio j. k. en Targoviŝte okazis Internacia Ŝakturniro „Targoviŝte'82“, dediĉita al la 100-jara datreveno de la naskiĝo de Georgi Dimitrov.

La ŝakturniron partoprenis 28 ŝakludantoj el 16 loĝlokoj en Bulgario kaj Hungario.

Estis premilitaj la unuaj dek konkurantoj, kiel sekvas: Krastju Dimitrov (Sofio), Dimitar Aleksiev (Targoviŝte), Suzana Polgar (Budapeŝto), Rumen Kostadinov (Stara Zagora), Venci Stamenov (Targoviŝte), Nikolaj Kolev (vilaĝo Krepĉa), Evtim Karabakalov (Targoviŝte), Stojan Georgiev (Radnevo), Stojĉo Bojilov (Targoviŝte) kaj Vladimir Dimitrov (Botevgrad).

La programo de la ŝakfestoj entenis ankaŭ fulmturniron, kiun gajnis Stojan Georgiev el Radnevo.

Jugoslava ŝakmajstro Emir Dizdareviĉ plenumis seancon sur 20 ŝaktabuloj. Li gajnis 18 partiojn kaj malgajnis 2.

Kaj Sofija Polgar (Hungario) plenumis seancon kun junpioniroj sur 10 tabuloj. Ŝi sukcesis venki en 8 partioj, malgajnis nur 2.

La ŝakfestivalo „Targoviŝte'82“ estis organizita memore al la ses infanoj el vilaĝo Jastrebinovo, murditaj de la faŝistoj en 1943.

**E-societo „VERDA ESKADRONO“,
Targoviŝte**



La poŝtista E-societo „Heroldo“ en Sofio aranĝis kunvenon, dediĉitan al la 100-jara jubileo de Georgi Dimitrov. Prelegon pri la vivo kaj la agado de Dimitrov kaj lia rilato al la Internacia Lingvo Esperanto faris la membro de la societo ing. Georgi Stoilov el la Scienc-Esplora Instituto pri Komunikado.

Lozan VALOV

ANONCO

LETERVESPERON ORGANIZOS KOMENCE DE NOVEMBRO J. K. E-GRUPO EN WRIEZEN. ONI ATENDAS LETEROJN KAJ BK EL LA TUTA MONDO. RESPONDO PER BELAJ BK: E-SOCIETO EN KL, LOKA ESTRARO, 1913

Wriezen DDR—GDR

NIA E-JUNULARO



... en Orjaĥovo



... en Kneja



... en Svoge

distroj

HEJMA ZOOPARKO

La domo de Anatoli Zlatarov en kvartalo Asparuhovo en Varna estas vera miniatura zooparko.

Jam de la strato oni rimarkas, ke tie ĉi loĝas homo kun riĉa fantazio. La feran kortopordon ornamas figuro de mara ĉevaleto, plue la eniranton bonvenigas figuroj de papago, de fiŝoj kaj super la ŝtuparo, kondukanta en la domon, pendas mara pejzaĝo kun surskribo „Sozopol — mia amata urbo“. Sur la enirpordo estas alnajlita hufofero, kaj apud la pordo estas notkajero kun ligita al ĝi kraĵono. Evidente tiun ĉi domon vizitas multaj homoj!

La edzino de la kolektanto invitas nin en la gastĉambron, kiu tamen similas kabineton de sciencisto: ĉie sur la bibliotekaj bretoj, sur la skribotablo — estas multaj libroj. Tio ĉi estas precipe atlasoj kaj scienca literaturo pri geografio kaj zoologio. Sur la muro estas videbla leona felo. „Tio ĉi estas la felo de nia leonido Reks — diras la dommastrino. — Kiam ĝi estis malgranda, ĝi ne prezentis danĝeron por la homoj. Mia edzo tre amis ĝin. Tial la disigo kun ĝi estis tre doloriga por li“.

Pli malfrue, interparolante kun Anatoli Zlatarev mem, ni eksciis, ke krom la leonido, tie ĉi trovis sian duan domon ankaŭ mangustoj, indoneziaj simioj, papagoj, fazanoj... La malgranda korto post la domo similis zooparkon. En la kaĝoj, ellaboritaj de Zlatarev mem loĝas 12 specoj de papagoj, tri rasoj de fazanoj. La dekoj da birdoj bezonas ĉiutagan prizorgadon, sed tio evidente ne malfaciligas Anatolion Zlatarev, ĉar rakontante al ni, ke li ĵus intervidiĝis kun homo, kiu portis bonegan ekzempleron de papagokakadu, en liaj okuloj mi vidis brili flamon de kolektanto-entuziasmo, preta je ĉio por la ŝatata hobia.

La pasio de kolektanto ĉe Anatoli Zlatarev aperis tre frue. Li ĉiam ankoraŭ gardas sian unuan harbuklon, sian unuan ŝueton. Pli malfrue, estante vic-kapitano en la Bulgara Komerca Floto, li navigis en multaj maroj kaj oceanoj, estis en diversaj ekzotikaj landoj kaj, kompreneble, konstante pliriĉigadis sian kolekton per plej diversaj objektoj, bestoj kaj birdoj.

Dum pluraj jaroj Anatoli Zlatarov havis korespondadon kun profesoro Bernhard Gzimek, kiu sendis al li sian libron kaj sian portreton kun aŭtografo, kun la angla sciencisto Darel, direktoro de la zooparko sur insulo Jersey, kie estis kolektitaj multaj jam malaperantaj specoj, kun la Moskva kaj Leningrada zooparkoj ka. Ĉiujare li partoprenas la ringprovizadon de migrantaj birdoj. Ĝis nun li provizis per ringoj pli ol 1500 ekzempleroj, kontribuante per tio por pruvo de la fakto, ke la birdoj el la nordaj regionoj pasigas la vintron en Dobruĝa (Nordorienta Bulgario), kaj la birdoj nestantaj en Bulgario, forflugas suden.

Anatoli Zlatarov estas bona amiko de la junpioniroj, ili ofte venas en lian hejmon kaj helpas al li laŭ siaj fortoj nutri kaj prizorgi la flugilhavan respublikon. Li verkis la libron „Miaj bestoj“, kiu certe baldaŭ estos en la manoj de la legantoj.

Iuj nomas lin strangulo, aliaj — birdbreddisto, sed mi dirus pri li jene: „En nia jarcento de la tekniko similaj modestaj kaj abnegaciaj naturamantoj devas ĝui apartan atenton kaj estimon!“

Zdravka ZAFIROVA

ANGULENIGMO

	A	B	C	Ĉ	D	E	F	G
A								
B								
C								
Ĉ								
D								
E								
F								
G								

En ambaŭ direktoj:

- A — Kolego, amiko.
- B — Publikigo.
- C — Maniero, vojo, procedo.
- Ĉ — Delikataodoro.
- D — Ĝoja voĉbruo.
- E — Faro
- F — Konkluda konjunkcio.
- G — Kemia simbolo de oksigeno

Aŭtoro: Stano MARČEK



DEZIRAS
KORESPONDI

AŬSTRIO

La Tutmonda Unuigo por Vivprotektado — poŝt-kesto 6, A-5033 Salzburg, Aŭstrio — dez. kor. kun esperantistoj-medi-vivprotektantoj el ĉi.

BULGARIO

Bistra Dojčinova (31-jara fraŭlino, instruistino de Esperanto) — 1233 Sofio, ul. „Kavala“ bl. 42/D — dez. konatigi kun serioza esperantisto-fraŭlo. Eblas reciproka gastado.

Diana Slavova (12-jara lernantino), Svoge, Sofijski okrag, kv. Drenov, „Sredna Gora“ 47 — kun ĉi pri ĉi.

Paulina Atanasova (22-jara instruistino en infandomo) — Zlatograd, ul. „K. Filipov“ 23, bl. „Zlatolist“.

Maria Ivanova (30-jara oficistino) — 7100 okrag Rusenski, ul. „Porojna“ 1 — kun ĉi, interŝ. BK kaj memoraĵojn.

Marko Markov — Dalbok dol, Loveŝki okrag — kun ĉi pri ĉi.

D-ro Nikolaj Tanev (emerita kuracisto kaj dentisto) — 9700 Sumen, „Otec Paisij“ 13 — kun ĉi pri vojaĝoj, historio, fremdaj lingvoj, sporto k. a.

Radka Marinova (35-jara kontistino), Trojan, j. k. „Mladost“ bl. 5 v.h. A, et. V.

Petrana Nikolova (30-jara kontistino), 5500 Loveĉ, bl. 206, v.h. 2.

Rumjana Nedjalkova — 5500 Loveĉ, bl. 201 v.h. D.

Kalin Petrov (13-jara knabo), 5500 Loveĉ, bl. „Canko Marinov“.

Daniela Asparuhova (18-jara junulino), 5500 Loveĉ, bl. 207, v.h. 2.

Elenka Ganeva (14-jara lernantino), 5500 Loveĉ, bl. 202, v.h. G, et. 2.

Genadi Vasilev (14-jara lernanto), 5500 Loveĉ, bl. 203, v.h. G, et. 7 — kolektas insignojn, maĉgumojn kaj aŭtoludilojn.

Nedka Colova, 5500 Loveĉ, bl. 202.

Katja Ivanova (18-jara studentino), 5500 Loveĉ, bl. 205, v.h. G, et. 4.

Antoaneta Jordanova (11-jara lernantino), 5500 Loveĉ, blok „Canko Marinov“.

Dobrin Angelov (21-jara gitaristo) Dulovo, Sili-strenski okrag, ul. „Šipka“ 27.

Milčo Karašov, 5500 Loveĉ, ul. „Car Krum“ 5.

Silvija Asparuhova (14-jara) — v. Ljulin, Per-niški okrag — pri ĉi.

Todor Todorov (31-jara) — v. Divotino, Per-niški okrag — pri muziko, sporto, kino, foto, E-literaturo. Interŝ. BK kaj insignojn.

HUNGARIO

Lernantoj de sepa kaj oka klasoj — kun bulga-raj samaguloj pri Bulgario kaj bulgara popolo. Ko-lektas BK, PM, insignojn, portretojn de geaktoj: — Szagan Erika — Magy Kossuth u. 41, sz. Magyar-oszag, H-4556.

— Pall Erzsebet — Magy Kossuth u. 37, sz. Ma-gyaroszag, H-4556.

— Hohath Tundo — Magy Kossuth u. 29, sz. Ma-gyaroszag, H-4556.

— Miterli Jbolya — Magy Petöfi S. u. 30, sz. Ma-gyaroszag, H-4556.

— Rago Ildiko — Magy Petöfi S. u. 13, sz. Ma-gyaroszag, H-4556.

— Svelta Piroška — Magy Petöfi S. u. 66 sz. Ma-gyaroszag, H-4556.

— Szakaly Csaba (11-jara lernanto) — 9700 Szom-bathely, Baratsag ut. 3. IV. 19 — kun bulgaroj.

— Urban Eva (25-jara instruistino de matematiko) — Jaszapati Kinizsai u. 23, H-5130 — kun bulgaroj pri infanoj, naturo, vojaĝoj.

— Teschessy Erzsébet (28-jara eksedzino kun-dekmonata filinetto) Kunsriget, Felszabadulas u. 30, Magyararszag, H-9184 — pri mezlernejaj trafikaj lernobjektoj (trafikekonomio, transporturo) kaj pri filmoj, teatro, literaturo, naturo, ekskursoj kaj nagado.

— Eszter Kolozsi (29-jara infana instruistino) — Krugy 40/c 2/6 Nyiregyhaza, H-4400 — kun bulga-roj pri BK kaj esperantaĵoj.

— Lajos Kovacs (37-jara ĝardenteknikisto) — Szerencs Előhegy ut. 14, H-3900 — pri BK, PM, vojaĝo, amatorfotografado.

— Stefano Farago, str. Karlo Marx 26, 2364 Oca.

SOVETUNIO

Kairi Roolah (12-jara) — SU-200016 Tallin, Estonio, Lehol 9-1 — kun ĉi, BK pri bestoj, kalen-daretoj kaj glubildoj.

Kätlin Viljarand (12-jara) — SU-203054 Laagri, Sae 4-3, Estonio — PM, BK, bestobildoj, glu-bildoj, kalendaroj.

Riina Vei (12-jara) — SU-200016 Tallin, Lehol 9-25 Estonio — kolektas kalendarojn, glubildojn.

Helica Rohumaa (12-jara) — SU-200009 Tallin, Sanatooriumi 6-2, pri ĉi.

Margit Kaldaru (12-jara) — SU-203054 Laagri, Sae 4-14, Estonio — kolektas BK, glubildojn, kalen-darojn, bestobildojn, PM.

Urmars Rannu (12-jara) — SU-20009 Tallin, Sobra 25, Estonio — kolektas PM kaj aŭtomodelojn.

Tuuli Telma (13-jara lernantino) — SU-200009 Tallin, Pollu 128-572, Estonio — kolektas kalen-darojn kaj glubildojn.

Asra Estorn (librotenistino) — SU-200006 Tallin, Välja 8-261, Estonio — kun ĉi pri turismo kaj voja-gado.

Vladimir Beljaev, abonem. jaŝtik 29, 357 600 — Essen-tuki, USSR — kun ĉi pri ĉi kun diversagaĵoj s-noj.

Inteŝ. interesarojn laŭ reciproka deziro.

Sur la unua kovrilpaĝo: Foto por memoro!

Ĉefredaktoro: Dončo ĤITROV

Vicĉefredaktoro: Ĥaim LEVI

Respondeca sekretario: Lidia RAEVA

Redakta komitato: Marin BACEV, Vasil BOROVSANI,
prof. Vasil ĈOĈOV, Dimitar ĤAGIEV, Krastju KARU-
CIN, Flori NIKOLOV

Administranto — Kalinka VASILEVA

Revuo „Bulgara Esperantisto“ — fondita en 1919,
distingita per ordeno „Ĉirilo kaj Metodo“ — I grado.
Eldonkvanto 6500.

Adreso de la redakcio:

„BULGARA ESPERANTISTO“

Bul. Ĥristo Botev 97,
1303 Sofio, Bulgario

P. K. 66
1 000 Sofio

tel. 31-70-19

Presejo „Georgi Dimitrov“ (II bazo)

ETAR LAND

PARKO-MUZEO „ETAR“

Ok kilometrojn sude de la bulgara urbo Gabrovo — mondkonata pro la Festoj de la Humuro — troviĝas Etnografia Parko-Muzeo „Etar“. Ĝi etendiĝas sur tereno de pli ol 6 hektaroj en la valo de la rivereto Siveka. La unuan konstruaĵon de la muzeo oni komencis konstrui en 1963 laŭ ideo kaj sub la gvidado de Lazar Donkov¹, kiu pli malfrue estis ĝia direktoro.

La etnografia muzeo montras la arkitekturon, la vivmanieron kaj la evoluon de la malnovaj metioj en la regiono de Gabrovo de la mezo de la 18-a jarcento ĝis la liberigo de Bulgario el sub la turka jugo en 1878. Dank' al la entreprenemo, de la homoj el la tiama epoko, en Gabrovo oni praktikis 26 metiojn kaj tio estis preskaŭ ĉiuj metioj, kiuj ekzistis en iama Bulgario.

„Etar“ ne estas nur muzeo, ĝi spiras kaj vivas, ĝi funkcias kaj produktas. La malnovaj metiistoj de Gabrovo uzis la akvon kiel ununuran energi-fonton. El la muzeo la nunaj „metiistoj“ same produktas la iamajn ellaboraĵojn laŭ la samaj malnovaj teknologioj kaj per la samaj malnovaj laboriloj, kion povas konstati ĉiu vizitanto.

En la sino de Balkan-montaro, sur ambaŭ bordoj de la rivereto la loĝdomoj, la laborejoj kaj la mastrumaj konstruaĵoj troviĝas en sia specifa medio. Kelkaj el ili estas konstruitaj antaŭ pli ol 100 jaroj kaj nun estas restarigitaj, aliaj estas translokigitaj el la regiono de Gabrovo, triaj estas konstruitaj laŭ kopioj de jam ruinigitaj konstruaĵoj.

Ĉi-somere mi havis la feliĉon viziti la muzeon, pri kiu mi estis multe aŭdinta. Enirinte tra la arkforma pordego, ellaborita el kverkaj tabuloj, ligita per grandkapaj forĝitaj najloj, la unua objekto, kiun mi vidis, estis loĝdomo de la dua duono de la 18-a jarcento, konstruita en nacia stilo. En la unua etaĝo oni vidas la internan arangan de loĝejo el Gabrovo kaj en la surtera etaĝo trinkejo allogas la vizitantojn. Apude staras vilaĝaj bakforno kaj rostilo, kies stangojn movigas la akvo de la rivereto. Sekvas ankoraŭ funkcia forĝejo kun blovilo, farita antaŭ pli ol 150 jaroj kaj tranĉil-farejo kun mekanika akrigilo de la dua duono de la 19-a jarcento. Poste vidigas malnova, en la mezo de la 19-a jc. ĉi tie konstruita tepavica² kun apreturejo por hejmteksita lanŝtofo. Malantaŭ ĝi estas tornejo, kie oni produktas lignajn pelvojn kaj skatolojn por konservi salon, pipron, fromaĝon k. a. Oni vidas ĉi tie ankaŭ malnovan manĝotablon faritan en la dua duono de la 19-a jc. Jen estas ŝnurfarejo konstruita en 1854 en Gabrovo, tinkturejo, konstruita meze de la 19-a jc., akvomuelejo, konstruita en 1874 kaj seĝejo de la dua duono de la 19-a jc. Krome vidigas vilaĝana domo kun la mastruma korto kun staloj, pajlejo, grenejo ktp.

Kaj nun ni iru tra la ŝtona ponto, konstruita en malnova stilo, sur la alian bordon de la rivereto kaj ekmarŝu laŭ la Strato de la Metioj kovrita per „kalda-ram“³, nomata „Ĉarŝijata“, kie ni ĝuos la kapriĉan konstrustilon de la regiono de Gabrovo. Jen estas tanejo



kaj potfarejo, jen estas oraĵejo kaj kuprejo, jen estas sukeraĵejo, kie ni aĉetas „sukerajn koketojn“ — iama kaj nuna delikataĵo porinfana. . .

Ni turnadas kapon jen dekstren, jen maldekstren por ne pretervidi ion kaj preskaŭ forgesas rigardi el la domfenestroj, de kie al ni kviete ridetas multaj geranioj — ŝajne la ununura iama ĉambra floro en ĉiu malnova bulgara domo, simbolo de la bulgara animo. Kaj denove vicigas metiejo post metiejo. . . Jen estas ŝpinejo kaj teksejo, pantoflofarejo, peltofarejo kaj laborejo por bovinaj sonoriloj. Jen estas bakejo, kie ni povas aĉeti varmajn bulkojn kaj mane faritan panon. Jen estas kafejo, kie ni kun plezuro trinkas dolĉan turkan kafon en ege malvasta salono. . . Jen estas silkteksejo, ĉarfarejo, laborejo produktantaj selojn. . . Jen estas la Domo de Sakov kun sia bakalnica⁴ de la mezo de la 19-a jarcento.

Kaj ĉar estas somera varmaga tago, ni iru kvietigian soifon. Kien? Ni simple dellankiĝu de la vojo kaj trinku el la freŝa, malvarma kaj dolĉa monta akvo, ŝprucanta el ŝtona konstruaĵo. Ni plenigu la kupran taŝeton. . . Sed momenton! Sur la ŝtono ni legu la engravuritaĵajn vortojn: „La vento forviŝas niajn spurojn kaj la tempo poste nin englutas. Konstruita estas tiu akvofonto, ĉar la ŝtono estas pli longdaŭra ol la homo kaj la akvo estas eterna. . .“

Elirinte el la muzeo „Etar“ ni havas plenan imagon pri la iama granda laborejo Gabrovo, kiel ĝin nomis iam la vojaĝanto Felix Kanitz. La promenado en la muzeo estas vera leciono de historio.

Marin BACEV

¹ Forpasinta en 1976.

² Tie oni prilaboras lanaĵojn per batoj kaj akvo.

³ Vendejo pri hejmaj varoj, precipe pri nutraĵo.

⁴ „Kalda-ram“ — ŝtonpavimento